

## MALFERME AL ESPERANTISTOJ

La situacio, en kiu nun troviĝas REU, estas ambigua. De unu flanko, multo estis atingita, kaj plejparto de la multo estas merito de la ĵus demisiinta Estraro, kiu preferis nomi sin “teknika”. Tre gravajn aferojn sukcesis realigi M.Ĉertilov, V.Seguru, R.Bolšakov kaj J.Karcev, kaj mi sincere dankas ilin. Inter la ĉefaj faritaĵoj menciindas la okazigo de REK en Sankt-Peterburg, la akiro de REU-oficejo, konstanta jura adreso kaj banka konto. Bone funkcias la retejo <reu.ru>, regule aperas “Bulteno de REU” (kiun lastatempe kompilis G.Kokolija). Sed samtempe ekzistas multegaj problemoj, kiuj postulas solvon se ne tujan, do sufiĉe rapidan. Tio bremsas laboron por estonto – estas tro da aktualegaj taskoj. Se ne plenumi ilin, neni agado estas planebla.

Ne estas agrable listigi malfacilaĵojn, sed ni estu honestaj antaŭ la membraro. Ekzistas financaj problemoj – malgraŭ ĝenerala sukceso, REK ne estis profita, eĉ inverse. Sed sen garantiita monsumo (almenaŭ ioma) ni ne povas eldoni, ekzemple, subtenajn materialojn por E-kursoj en diversaj urboj, sekve REU ne povas plani tiujn sia iniciate. Same pri ekstera informado kaj multo alia.

Krome estas librotenaj problemoj, kiuj malhepas uzadon de nia banka konto – ekzemple, peti subvenciojn (se ni ie petos kaj ricevos aprobon, ni devas havi senprobleman vojon por ricevi realan monon).

La retejo <reu.ru> funkcias bone (dank’ al longa laboro de A.Grigorjevskij), sed ĝi bezonas aspektan modernigon (“redzeajnon”) kaj aldonon de multaj informhavaj paĝoj.

Kaj simile.

Kiel Prezidanto de REU mi vidas kiel plej ĝeneralan taskon de la nova Estraro prepari la Union por bona funkciado en estonto kaj provi fari la unuajn paŝojn nun. Ni devas organizi financan-administran flankon, ke la sekva Estraro (kiu ajn eniru ĝin, eĉ se la samaj homoj) klare sciu kion kaj kiam necesas fari pri la buĝeto, bilanco, oficejo ktp. Ni devas kompreni, kiujn servojn REU povas proponi al siaj membroj, inter kiuj (la servoj) la ĉefa estas Libroservo, bezonanta reformojn kaj revivigon. Ni devas multan atenton doni al reta agado – establi kelkajn novajn platformojn por informado, kunlaboro de E-klubo kaj diskutado. Ni devas lanĉi tutlandajn diskutojn pri tre konkretaj temoj, aktualegaj por la movado. (La laborplanon vi povas legi ĉi-numere, p. 23) Kredeble fine de nia laboro dum la sekva jaro oni ricevos pli bonan Union, kiu funkcios pli bone.

Krome estas aparta tasko. La Estraro de REU, pardonu la rusionon, devas esti “pli proksima al la popolo”. Ĉiu homo, havanta ideon aŭ demandon, povos tute facile kontakti la Estraron kaj ricevi bonvenigon aŭ respondon. “Malferme al esperantistoj” estu la nova laborprincipo de REU.

Oni scias, ke akiri altan postenon en E-movado estas tre facile. Sed estas ege malfacile meriti gratulojn ne pro elekto, sed pro rezultodona laboro. Ni provos.

REU: ni kune!

*Grigorij Arosev, Prezidanto de REU*

Ĉi-numere ni publikigas la respondojn de Maja Loskutova (Ivanovo, naskiĝjaro 1984) kaj Dmitrij Ŝevĉenko (Moskvo, naskiĝjaro 1985) al la preparita de REGo speciala demandaro por denaskaj esperantistoj.

1. Kiu el la gepatroj (aŭ ambaŭ) instruis al vi E-on?

**ML:** Mia panjo, Tatjana Loskutova.

**DŜ:** Esperanton al mi instruis<sup>1</sup> ambaŭ gepatroj.

2. Ĉu via patro aŭ patrino alparolis vin ĉiam ekskluzive en Esperanto aŭ fojfoje uzis ankaŭ la rusan lingvon?

**ML:** Ĝis mia 7-jariĝo mia panjo alparolis min nur Esperante – por ne havi ruslingvajn malfacilaĵojn en la lernejo (poste la alparolo estis alterna: ruse aŭ Esperante depende de situacioj).

**DŜ:** Miaj gepatroj pli multe parolis kun mi en Esperanto kaj miaj geavoj ruse.

3. Ĉu vi kontaktis aliajn plenkreskajn esperantistojn, estante infano?

**ML:** Jes, dum E-renkontiĝoj kaj E-klubkunvenoj.

**DŜ:** Jes. Multajn. Tio okazis en tendaroj, kluboj, kongresoj, kien veturigis min miaj gepatroj. Ankaŭ gaste al nia hejmo venadis multaj esperantistoj.

4. Kiam vi ekkonsciis, ke vi parolas lingvon, alian ol la rusa, kaj kiamaniere vi klarigis tion al vi mem? Kiajn sentojn vi havis ĉe tio?

**ML:** Esperanto estis “nia” lingvo. Lingvo, kiu ligas min kun mia panjo, niaj vojaĝoj, aktivaĵoj kaj distingas de aliaj personoj. Ĉio alia estis ekstera mondo, kie oni parolas ruse.

Do, ekde la komenco ekzistis du paralelaj mondoj, du lingvoj...

**DŜ:** Tio okazis, verŝajne, kiam mi iris al la unua klaso de la lernejo. Tie estis multaj ruslingvaj infanoj kaj instruistoj. La kono de Esperanto estis por mi io memkomprenebla. Krome, mi konis en la infanĝardeno kelkajn aliajn dulingvajn infanojn el (eks)sovetiaj respublikoj, kiuj denaske parolis la rusan kaj la lingvon de propra popolo, pro tio dulingveco ne estis por mi io eksterordinara.

5. Ĉu vi iam havis fortan deziron paroli ruse kun la esperantiganta patr(in)o?

**ML:** Ne, eble nur senkonscie. Paroli Esperante estis nature kun mia panjo.

**DŜ:** Verŝajne iam volis, sed mi ne certe memoras tion.

6. Ĉu vi konas/memoras iujn infanajn E-lingvajn kantojn, versaĵojn, fabelojn? Ĉu la gepatroj instruis tion al vi?

**ML:** Mi memoras ke irante al la infanĝardeno mi deklamis parkere:



Maja Loskutova

<sup>1</sup> Ni ne instruis, ni simple parolis. – Elena Ŝevĉenko.



*Dmitrij Ŝevĉenko*

Hej, kienas vi sen laco,  
Kamarado Erinaco?  
Kion portas vi surŝultre?  
Portas mi da pingloj multe  
Al sciuroj, tri fratinoj,  
Diplomitaj tajlorinoj.  
Dum minutoj kvin – trik-trak!  
Estas preta via frak'!

Kun Sveta Gonĉarova (Sveta – 5-jara, mi – 3-jara) ni kantis: “Saĝulo konstruis domon sur la rok’...” dum E-renkontiĝo en 1987 sur la scenejo antaŭ pli ol 100-persona publiko. Vespere antaŭ ol endormiĝi dum certa tempo mi ŝategis aŭskulti “La nigra kokino” (la aŭtoron mi ne konas), kiun mia panjo devis legi dekon da fojoj.

Krome mia panjo ofte kantis al mi “Ne, ne, ne” (E-teksto de D.Lukjanec) kaj “Ni vojaĝas” (E-teksto de V.Ŝilas).

**DŜ:** Dum infanaj kongresetoj mi kantis infanajn E-kantojn, tamen mi apenaŭ povas rememori ilin. Miaj gepatroj legis al mi multajn infanajn librojn en Esperanto. Krome mia patrino verkis serion da fabeletoj pri malgranda leporeto kaj parkere rakontis ilin al mi.

*7. En kiu aĝo vi komencis legi en E-to? Kion nome vi tiam tralegis?*

**ML:** En la aĝo de 9 jaroj en la kastelo Greziljono. Nenion mi tiam povis legi krom la menuo. Tamen antaŭ ol veturi al Francio mi komencis deĉifri E-literojn laŭ la lernolibro de Istvan Szerdahelyi “Esperanto Internacia”.

**DŜ:** Verŝajne tio okazis, kiam mi aĝis 6 jarojn. Tiam mi tralegis bildstriojn “La faraono”, “Steloj de Eger” kaj kelkajn pri Tinĉjo kaj Asteriks<sup>1</sup>.

*8. Ĉu vi povas rememori viajn infanajn ruslingvajn diraĵojn, en kiujn vi enplektis E-ajn vortojn, morfemojn, sintaksajn konstruaĵojn?*

**DŜ:** Probable jes. Sed ĉi-momente mi ne povas rememori ilin precize.

*9. Ĉu vi ofte sentis mankon de adekvataj E-vortoj en la ĉiutaga lingvouzado? Ĉu estis okazoj, ke vi mem inventis bezonatajn E-vorton, sen helpo de la gepatroj?*

**ML:** Ne, neniun mankon de vortoj mi sentis.

**DŜ:** Ofte tio okazis. Mi ofte povis aldoni al la rusa vorto E-finaĵon, aŭ male mi “rusigis” esperantajn vortojn.

*10. Ĉu vi memoras, ĉu kaj kiel la rusa lingvo malhelpis al vi paroli E-te? Kion konkrete vi memoras?*

**ML:** Ĝis la momento kiam oni ĉiam hejme parolis Esperante, la rusa lingvo nek helpis, nek malhelpis. Poste, kiam la rusa iĝis pli uzata, jes, ĝi ĝenis. Sed tio estas jam alia afero...

<sup>1</sup> Ni ne instruis ankaŭ legadon. Nia filo komencis legi, post kiam li ellernis la anglan alfabeton. Li demandis min nur, kiel legi la ĉapelitajn leterojn. – *Elena Ŝevĉenko*.

**DŜ:** En la unuaj klasoj de la lernejo mi spertis “lingvan ŝokon”, kiu pliriĝis la vortprovizon de mia rusa lingvo kaj malriĝis la Esperantan. Kiam mi venis al mia unua Infana Kongreseto, mi komence preskaŭ ĉiufraze ne povis trovi en la kapo taŭgajn vortojn, sed post 2-3 tagoj mi jam flue parolis, rememorinte/lerninte bezonatajn Esperantajn vortojn.

*11. Ĉu la kono de E-o helpis vin lerni aliajn lingvojn?*

**ML:** Jes, helpis al mi lerni la francan. Foje nesciante francan vorton mi prenas Esperantan radikon, aldonas al ĝi francan finaĵon kaj jen!

**DŜ:** Ne. Mi pensas, ke utilis lerni komence pli malfacilan latindevenan lingvon (ekz. la germanan). Kiam mi lernis la anglan en la lernejo, mi longe pigris ellerni ĝian komplikan, kompare kun Esperanto, gramatikon, mi ne komprenis kial mi devas prononci vortojn malsame, ol ili estas skribitaj kaj krome mi ofte uzis ĉapelitajn leterojn en skribaj anglalingvaj ekzercoj.

*12. Kiom da fremdaj lingvoj vi nun posedas?*

**ML:** Fakte nur la francan, iom la anglan – laŭ nivelo de la lerneja programo pli-mapli.

**DŜ:** Mi havas bazajn konojn de la angla, kiun mi lernis de tempo al tempo dum ĉirkaŭ 15 jaroj. Mi povas sufiĉe bone legi kaj kompreni eĉ komplikajn teknikajn tekstojn, sed mi ĝis nun ne komprenas ĝian gramatikon kaj preskaŭ ne kapablas paroli ĝin. Mi ankaŭ studis la ĉinan lingvon en la universitato, tamen mi konas ĝin baze kaj ege malbone.

*13. Kiamaniere vi ĝuas Esperanton kompare al viaj samaĝuloj neesperantistoj?*

**DŜ:** Eĉ en la nuna mondo, unuiĝanta per modernaj retoj, Esperanto restas bona rimedo kontakti homojn el dekoj da landoj, uzante unu lingvon. Esperanto-renkontiĝoj (konkrete internaciaj) “kunpuŝas” tiom da reprezentantoj de diversaj landoj, kiom ne havas ajna alia renkontiĝo de neesperantistoj. Mi ĝuas unikan globalan E-etoson kaj propran apartenon al ĝi.

*14. Ĉu vi iam proponis al viaj geamikoj lerni E-on? Kiel ili reeĥis?*

**DŜ:** Jes. Interese, malgraŭ la onidiroj, la plejmulto rilatas al Esperanto tre bone kaj eĉ ofte troigas ĝian potencon kaj influon. Multaj miaj konatoj komencis lerni Esperanton, sed mi havas dume neniun informon, ĉu iu el ili havas sukceson pri tio.

*15. Ĉu iam vi sentis konsterniĝon, kontaktante plenkreskulon, malbone posedantan E-on?*

**ML:** Jes, estas strange kiam persono pripensas por konstrui la frazon. Sed tio rilatas nur al komencantoj sendepende de ilia nacio kaj la lernata lingvo...

**DŜ:** Verŝajne, ne.

*16. Ĉu iam vi sentis ĝenon, parolante kun esperantisto, kiu, ne estante denaskulo, posedas la lingvon pli bone ol vi?*

**ML:** Jes! Mi sentis tiun ĝenon. Post tio (kaj pro tio) mi komencis vigle legi E-literaturon por plialtigi mian lingvan nivelon.

**DŜ:** Ne. Ekzemple, en mia universitato, mi pensas, studas/instruas eksterlandanoj, kiuj pli bone konas la rusan lingvon, ol mi. Tamen ankaŭ tio ne ĝenas min.

17. Ĉu vi sentis, ke la eksteruloj opinias, ke vi devas esti ĉionscia en la lingvo?

**ML:** Jes, mi havas tiun senton.

**DŜ:** Tio ŝajne neniam okazis.

18. En kiu aĝo okazis via unua partopreno en E-aranĝo, kie vi parolis ankaŭ kun aliaj esperantistoj? Kiujn nome E-aranĝojn vi partoprenis en infana aĝo? Kiujn en la lerneja aĝo?

**ML:** La unua E-renkontiĝo, kiun mi partoprenis, estis familia

E-renkontiĝo. Ĝi okazis en 1986 apud Kujbiŝev. Poste sekvis kelkaj aliaj, sed pli ofte mi ĉeestis E-staĝojn en la kastelo Greziljono (Francio) dum mia lerneja aĝo. Krome mi partoprenis la Internacian Infanan Kongreseton en 1998 (Montpellier, Francio).

**DŜ:** La unuan rusian E-aranĝon mi ne memoras. Mia unua eksterlanda E-aranĝo estis UK kaj IIK en Vieno. Tiam mi aĝis 7 jarojn. Miaj gepatroj veturigis min, en infana kaj lerneja aĝo, al pluraj dekoj da diversnivelaĵoj E-aranĝoj. Inter ili estis ekzemple UK, IJK, IIK, SAT-kongreso, REK ktp.

19. Ĉu vi, en lerneja aĝo, korespondis kun aliaj esp-istoj?

**ML:** Jes, mi skribis leterojn al miaj eksterlandaj amikoj.

**DŜ:** Ne. Eble mi sendis al iuj esperantistoj nur kelkajn bildkartojn dum la tuta lerneja aĝo. En la fino de superaj klasoj aperis Interreto kaj mi komencis korespondi.

20. Kio helpis (aŭ malhelpis) vin resti ne nur E-parolanta, sed ankaŭ esperantiano (ja multaj denaskuloj ne iĝis esperantistoj)? Ĉu kontaktoj kun E-klubo, E-movado, partoprenoj en E-aranĝoj? Kion vi sentas en kompanio de esperantistoj?

**ML:** Verŝajne, pli malpli regulaj partoprenoj en E-renkontiĝoj, kontakto kun aliaj aktivaj esperantistoj. Estante inter esperantistoj mi sentas min hejme (en ĉiuj bonaj sencoj de tiu vorto).

**DŜ:** Verŝajne, tio estas unika etoso de E-aranĝoj, kiun forgesi ne eblas.

21. Ĉu laŭ vi estus utile, ke denaskuloj unuiĝus en aparta komunumo (asocio, virtuala klubo, speciala retpaĝo aŭ forumo)?

**ML:** Mi pensas, ke estus interese paroli inter si (dum E-renkontiĝoj, ekzemple), sed ne nepre unuiĝi en apartan grupon.

**DŜ:** Ne. Apartismo ne estas bona afero.

22. Ĉu vi dezirus ke viaj infanoj iĝu denaskaj esperantistoj?

**ML:** Jes, kaj mi opinias tion tute natura afero.

La 25-an de majo Dmitrij Ŝevĉenko (Moskvo) defendis kun perfekta noto disertacion pri periodaĵoj en Esperanto. Tio okazis en la Rusia Universitato de Amikeco inter la Popoloj (Российский Университет Дружбы Народов). La oponanto/recenzanto estas fama esperantisto M.I.Isajev (doktoro, profesoro, akademiano de Rusia Akademio de Naturaj Sciencoj). Pliajn detalojn, fotojn kaj komentojn oni povas trovi ĉe: <<http://www.ipernity.com/blog/55113/252420>>. **(esperanto-rus-informoj)**

# **Preface**

Mi petas ne rilati al miaj pritaksoj por la tradukoj kiel al iu definitiva aprezo. Tio estas ne pli ol mia persona, vere subjektiva, opinio. Se vi havas alian vidon de la pritaksitaĵo, bonvole skribu ĝin al mi. Tiel ni per komunaj fortoj pli bone komprenos la rusan proverbon kaj trovos laŭeble proksiman tradukon por ĉiu traktata proverbo. Sian pritakson de la unua tradukita proverbokvino sendis dume nur Svetlana Konjaŝova, tiu mirinda homo, kiu, loĝante en profundprovinca vilaĝo de Fora Oriento, e-lerninte koresponde, sin levis e-kulture per abunda legado de e-libroj kaj e-kulturaj revuoj. (Ho ve, la urbanoj ne trovas tempon e-legi). Mi esperas, ke pli multaj sendos al mi sian pritakson de ĉi-tieaj tradukoj.

**Aprezo** de S.Konjaŝova: (sinsekve de la 1-a loko ĝis la 5-a)

La 1-a proverbo: S.Kotljarov, A.Gonĉarov, K.Ilutoviĉ, N.Neĉaev.

La 2-a: S.Kotljarov, N.Neĉjaev, A.Gonĉarov, K.Ilutoviĉ.

La 3-a: N.Neĉjaev, A.Gonĉarov, K.Ilutoviĉ.

La 4-a: N.Neĉjaev, A.Gonĉarov, K.Ilutoviĉ, S.Kotljarov.

La 5-a: A.Gonĉarov, kaj egale taksataj en la 4-loko la variantoj de K. Ilutoviĉ, S.Kotljarov, N.Neĉjaev.

Kaj nun ni vidu la tradukan oferton. Akceptu mian fojfojan amikan humureton.

## **1. Муж и жена – одна сатана.**

Anatolo Surnakin (AS): *En geedza paro – unu satanaro.*

AG: Neĝuste perceptitas la proverbo. Kial ne du *satanaroj*, aŭ ne tri? Ja temas pri la sama (одна и та же) satano. La nerusoj tro malbone pensos pri ni, se niaj geedzoj komparatas eĉ kun aro da satanoj. Eble temas pri la persona sperto de la tradukinto?

Marina Kocarj (MK): *Edzo kaj edzino estas la samaj diablo kaj diablino.*

AG: Estas simpla laŭvorta traduko, krom unu vorto *satano*, fakte ŝlosila, rusece insulta, kies (kiun) sencon ne indus anstataŭigi. La nocio *diablo* estas multe pli forta sence ol *satano* (Laŭ PIV: **satano 1** *Anĝelo, akuzanta la homojn kaj denunciante iliajn kulpojn. 2 Ĉefo de la ribelintaj anĝeloj.*) Krome mankas rimo.

Viktor Laptev (VL): *Samgrada pesto geedzoj estas; aŭ: Edzino kaj edzo kune estas bestio unu.*

AG: En la unua varianto nesukcesa vorto estas *pesto* kies senco superkovras la sencon de la ŝlosila rusa *satano*. Ja la pesto estas danĝeriga por ĉiuj samlokanoj, sed ne la geedzoj, kiuj satanas ĉefe unu al la alia. En la dua varianto same plifortas la senco de la vorto *bestio* (PIV: **1** *sovaĝbesto. 2 sovaĝinstinkta senbride performema homo*) ol la bezonata rusa *satano*. Sed la e-vorto *bestio* estas, laŭ mi, pli proksima al la rusa *сатана* ol *диабло*. Krome la vortordo en Esperanto ne estas plene libera, do la cifero kutime sidas antaŭ la vorto al kiu ĝi rilatas. En ambaŭ variantoj nur aludo al rimo.

Svetlana Konjaŝova (SK): *Edzo kaj edzino estas unuopinia kombino; aŭ: Edzo kaj edzino harmonias en sia kabano ili estas unu la tuto kiel satano. (la rusoj kiam in-*

*sulte diras pri homo nomas lin “satano”*)

AG: Ĉu la satanoj povas harmonii? Kiam mi tralegis la tradukojn mi “falas desur la seĝo” kaj kuris al la biblioteko konsulti la Dalj-proverbaron... plulegu ĉi-sube ĉe (post) KI. Nun mi nur notu la duan varianton tro longa por esti proverbo (konciza multondira diraĵo).

Klara Ilutoviĉ (KI): *Edzo kaj edzin’ – la sama vivdestin’* (komunaj zorgoj, problemoj, sukcesoj, fiaskoj, kulpoj, ĝojoj, malfeliĉoj); aŭ: *Edzo kaj edzin’ – duonoj de unu kombin’* (faras la tuton).

AG: Absolute **ne bezonatas** la enkrampaj **aldonoj**, kiuj atestas la heziton de la tradukisto esti ĝuste komprenata. En ĉi kazo la hezito estas elvokita intuicie, ĉar la proverbo estas (plej unue) neĝuste komprenita, ĉar la tradukinto, verŝajne, kunpuŝiĝis nek kun la situacio proverbe respegulata, nek kun la apuduloj tion dirintaj por iu konkreta kazo. Mi ne vane diris enkonduke al la proverbo-tradukado, ke gravas la ŝlosilaj vortoj (kaj/aŭ ties senco) en la proverbo, ke ilin indas laŭeble lasi en la tradukaĵo. Kaj la termino *satano* laŭ PIV kaj aliaj vortaroj ne portas pozitivan sencon. Do, certe ne pri la destino temas (kaj ne pri la unuopinia kombino ĉe SK), sed pri la netrankvila situacio en la familio, pri la provo mallonge diri pri la malpacaj (kverelantaj) geedzoj.

Do mi trovis en la Dalj-kolekto de rusaj proverboj la respektivajn du sinsekvajn (eĉ samliniajn) popolajn diraĵojn: “Муж и жена одна душа. Муж и жена одна сатана.” Sekve, temas pri du malsamaj, eĉ kontraŭaj, geedzaj statoj! Mi faris la eksperimenton. Unue mi demandis la sencon de la proverbo ĉe tri junulinoj diversloke laborantaj en la biblioteko. Ĉiuj tri respondis ion similan al la: *edzo kaj edzino bone kunvivas...* Poste mi telefonis al du mi-aĝaj virinoj kaj ambaŭ respondis pri la kverelaj geedzoj... La samon elscias ankaŭ mi tra miaj 70 vivjaroj. Se fajne, do mi plidetalu: kiam de ekstere oni provas difini, kiu el la kverelaj geedzoj pravas, post preparolo iu ŝvingas manon kaj fine diras: “a., муж и жена одна сатана”. Konkludo: se tradukanto sentas ian heziton ĉukompreni la proverbon nepre demandu ĉe la popolanoj, preferinde aĝaj, kiuj jam uzis (aŭ aŭdis uzata) la proverbon. Min mirigis la fakto ke la malpli aĝaj imagas la satanon ia “rozkolora” estaĵo... Sekve la tradukoj de KI kaj SK pli taŭgas por la alia Dalj-notita geedza interrilato, tiu proverbo eniris la sekvan tradukporcion.

## 2. Хорошая “мысль” приходит “опосля”

AS: *Bona pensado post pripensado.*

AG: Absolute netaŭga traduko kun la misa rimo *ad-ad*. Mi konsilas al AS komenci legi e-versaĵojn, eĉ parkerigi iujn... La frazo de AS, se abstrakta, havas iun nebulan sencon ekster la proverbo.

MK: *Bedaŭrinde, bona “se” alvenas nur post malbona “jam”.*

AG: Estas normala transdono de la ideo sed kun plena perdo de ruseco kaj manko de rimo.

VL: *Post fin’ de laboro ideoj bonas – de kio komenci laboron bezonus; aŭ: Ĉiam penso pli bona venadas post labora krono; aŭ: Aperas ide’ pli efika, kiam malfruas apliko.*

AG: La unua varianto estas malkonciza; la tria varianto estas konciza kaj plaĉa sed

malbone rimas *-iko/-ika*. Videblas hasto de la traduko. La dua varianto estas konkurenckapabla, sed ĝin eblas plibonigi, forpreninte la pezigan sufikson *-ad-*. Ja la vorto *ĉiam* jam transdonas la sencon de *ad-ado*.

SK: *Bona penso kutimas viziti kiam malfruas profiti*; aŭ: *Bona penso encerbiĝas en momento kiam jam pasis la evento*.

AG: La unua varianto estas tre bona. En la dua varianto, bonege rimata, mankas la “proverba muziko pro la longo”.

KI: *Bona (ĝusta inda, konvena, taŭga) penso malfruas al mensio*; aŭ: *Ideo bona jam senbezona*; aŭ: *Problem’ foriris – la solv’ ekspiris*.

AG: La plej trafa estas la unua varianto, sed la tradukanto devas mem elekti la taŭgan vorton ĉu *bona* ĉu *ĝusta* ktp. La du ceteraj variantoj nebulas transdonas la ĝustan sencon de la rusa diraĵo. Bedaŭrinde neniuj kuraĝis transdoni la fajnan ruseskon de la iom kriplaj vortoj *мысля* kaj *опосля*. Evidente ĉiuj pensis, ke ne eblas peri al alinacioj la rusan menson. Mi subtenas la opinion, ke **ĉio estas tradukebla**, sed oni povas dume ne trovi la solvon. En la ĵusa kazo mi proponus: *Bona penso vostje venas ĉiam postje*; aŭ: *Bona pensio malfruas al la mensio*.

Mi ilustru per kelkaj elnotoj, ke oni senĝene kripligas e-vortojn, per tio transdonante la bezonatan impreson aŭ efekton, zorgante, cetere, la kompreneblon:

“**Jis, jis**, nutras ilin la patro ĉielo! tial la **pasiroj** elpistas la **hordion** kaj la perdikoj **bikumas** la vinberojn...” [kompreneble, la leganto jam sciis la e-vortojn: *pasero, hordeo, , bek(um)i*, rim. de AG] (*Moderna Kroatio Prozo*, Zagreb, 1979, p.263, trad. Roger Imbert)

“Karaj **Kameratoj**,” komencis Gadi, post kiam ĉiuj eniris kaj fermis la pordon.

“**Karraj kameratoj**, ĉi tie vi **vidi** vian karran **nofan** kameraton, kiu veni nur en **tie ĉi** momento”.

(Reuven Kritz, *Freŝa mateno*, eld. *Libroj “Pura”*, Israelo, 1967, p.68, el la hebrea trad. Ota Ginz)

“Nu, kial li ne ridus, ankaŭ li estas homo **ki’l** ni ĉiuj, – protestas la viglega junulineto. – Ne li estas ia **gen’ralo** aŭ **kap’tano**, sed ĝuste Tito.” [loka parolmaniero, rim. de AG] (Branko Ćopić, *La legindaj partizanoj*, Saraevo, elbih, 1987, p.63, el la serba trad. Branko Miljko).

“La barono von Botzenheim sidiĝis sur alŝovitan seĝon ĉe la lito de Ŝvejk kaj diris: “Ĉeĥa **soltat’**, brava soltat’, kriplsoltat’ esti **kuraĝsoltat’**, multe ami **ĉeĥin** aŭstro.” ... “Mi legi **ĉjo** en gazet’, mi porti vin **manĝeti**...” [neflua lingvoposedo rim. de AG] (Jaroslav Hašek, *Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk dum la mondmilito*, eld. Kava-Pech, 2004, p.74, el la ĉeĥa trad. Vladimír Váňa)

Antaŭ jaroj mi esperantigis du rakontojn de Ŝukŝin, kaj dezirantoj vidi, kiel mi tradukis la popolajn diraĵojn, povas ricevi la rakontojn kun la ruslingva versio.

### 3. Не имей сто рублей, а имей сто друзей.

AS: *Ne havu cent rublojn, cent havu amikojn*.

AG: Ni vidas simplan tradukon kun iomete stranga vortordo. Ne estas proverbo sed simpla frazo.

MK: *Vi ne havu centon da rubloj, havu vi la centon da amikoj*.

AG: Fidele laŭvorta traduko, sed necesus rimo (por plibona memorfikso) kaj prov-



erba melodio.

NN: *Ne havu monujon tre dikan sed havu la rondon amikan.*

AG: Tre bona traduko, eĉ perdo de la ŝlosila vorto *cent* ne ĝenas min. La tradukaĵo havas ankaŭ la proverban melodion! Restas nur bedaŭri ke pro pezaj vivcirkonstancoj al la irkutska e-poeto, nekonata e-movade, mankas tempo por la kre-laboro, ankaŭ por proverbumi kun ni.

VL: *Preferu aron de amikoj karaj, ol rublocenton aŭ dolaron.*

AG: Tute bona traduko, kaj la provo modernigi ĝin per la vorto *dolaro* estas laŭdinda. Sed ĝustas ne *aron de amikoj*, sed *aron da amikoj*, ĉar temas pri la kvanto. Kaj bonus plibonigi la rimon *karaj – dolaron*. Mankis al mia delonga iam-SEJM-a e-kunaktivulo Viktoro ĝisiri la rimon: ... *ol centoj rublaj aŭ dolaraj (ol miloj rublaj aŭ dolaraj)*.

SK: *Cent rubloj estas malpli efikaj ol cent konsiloj amikaj.*

AG: Tute bona traduko, sed estas eblo “alkroĉiĝi”. La *konsilo* ne plenaloras *amiko*-n, ĉar amiko povas ne nur konsili, sed, kio pli gravas, ankaŭ prihelpi kaj kunanimumi. Krome neruso povas kompreni ke temas pri unu amiko, kiu donas cent konsilojn, kaj tio jam miskomprenigas la proverban sencon.

KI: *Cent amikoj pli donas ol cent rubloj proponas.*

AG: Tre bona traduko! Sed ne estas limo por la perfektigo: mi emas havi en e-versia proverbo la terminon *havi* kiu transdonas fajne pli da esprimivo ol *doni – proponi*. Kiam oni donas-proponas oni jam havas do cent amikojn. Sed havi-havigi cent amikojn estas pli defia tasko.

#### 4. Не рой яму другому – сам в нее попадешь.

AS: *Fosante kavon por alia, vi pensu: eble estos via.*

AG: Sufiĉe normala traduko. Tamen la dupunkto ne konvenas, ĉar la proverboj ĉefe uziĝas en la parola lingvo, kie oni ne sentas la dupunkton, nek aŭdas. Krome vi *pensu* estas multe pli malforta ol *сам... nonaдешь*.

MK: *Ne fosu la kavon al la alia – ĉar mem vi trafos ĝin.*

AG: Se vi anstataŭ la metus la vorton *iu*, neniom perdiĝus el la senco, ĉar ne temas pri konkretaĵoj jam sciataj. Sekve superfluas la artikolo. La traduko bonas, sed necesas havi rimon laŭ la kondiĉoj de nia traduklaboro. Kaj laste. Ĝenis min la dua duono de la traduko, kaj mi saltis en PIV-on kaj trovis la kialon de mia ĝeno: **PIV: mem... rim. 1 Estas rekomendinde meti la vorton *mem* senpere post la vorto, kiun oni volas emfazi.** Iame lerneĵano mi neniam aparte lernis la regulojn de la rusa lingvo. Tamen la diktaĵojn mi skribis preskaŭ senerare. La instruistino klarigis tion per la fakto, ke mi abundege legis ekde mia 6-jara aĝo. La panjo senrezulte “militis” kun mi, ĉar mi, ĝisatendante ŝian ekdormon, tuj piedpintis en la kuirejon kaj gluis la okulojn al libro. Ankaŭ en la kazo de esperanto mi ne legis-lernis la fajnajojn de e-ĝramatiko (ĉe Waringien k.a.), sed sentas la lingvon dank’ al la abunda e-legado.

VL: *Ne preparu por iu kaptilon danĝeran – trafos mem sur la denton feran.*

AG: Tre bona proverbo internacia. Sed ne laŭ rusa menso, kiu tamen uzas kavon kiel ĉefan akson de la proverbo. Nia tasko estas transdoni la rusecon, la rusan pensmanieron.

SK: *Kiu fosas kavon por aliulo falos ĝin mem rezulte de l' manipulo*; aŭ: *Kiu fosas kavon por aliulo laŭ sia em', riskas fali en ĝi mem*.

AG: En la unua varianto ne klaras: pri kia manipulo temas? Ĉu la fosado mallerta, ĉu iu ajna manipulo? Ni iru al PIV: **manipul'i 1** *Funkciigi per uzo de la mano... 2 trakti pli-malpli partie, nelojale*. Do la vorto *manipulo* ne respegulas la spirite malbonan agon de la fosanto... Vere bona estas la dua varianto, kvankam mi ŝatus pli mallonga la ĝiskoman parton por ke aperu ankaŭ proverba melodio...

KI: *Kiu al iu malbonon faras, tiu al si ĝin preparas*; aŭ: *Kiu pretigas por iu venenon, tiu ricevos la saman malbenon*; aŭ: *Kontraŭ iu l' atenco – sama la rekom-penco*.

AG: Ĉiuj variantoj estas neŭtrale bonaj, transdonas la spiritan rilaton al malbonfaranto. Sed forestas la rusa fosa kavo, respegulanta la tutan kosmon de tiu rusa nocio: kavo por tombo (iuj etnoj ekz. ne enkavigas sed bruligas la mortinton), kavo (branĉmaskita) por kapti iun beston ekz. urson, sed ankaŭ homon ktp. Transdoni la rusan spiriton estas pli malfacile ol transdoni la nudan ideon...

## 5. Милые бранятся – только тешатся.

AS: *Nune, insultante unu la alian, aminduloj kreis amuzadon sian*.

AG: Estas bona ekzemplo iomdiri pri la tradukarto. Ni tradukas proverbon tiel, ke alilingvano ne nur konu la enhavon sed ankaŭ havu la saman impreson kia en la rusa lingvo. El tia vidpunkto en la rusa duvorto *милые бранятся* la vorto *милые* nepre mildigas la sencon de la rekte tradukita *insulti*. (PIV: **insulti 1** *esprimi sian malbonhumoron per krudaj paroloj. 2 ofendi per malĝentilaj maldecaj vortoj*). Mi substrekis (en la unua senco de *insulti*) la vortojn kiuj ĉi-proverbe neĝuste peras la atmosferon inter la gekaruloj, kaj la dua senco tute misprezentas la menciitan atmosferon. Sed plaĉis al mi en la varianto de AS la vortoj *aminduloj* kaj *amuzado*, kiuj en la konvene plektita tradukaĵo ĝuste perus la rusajn sencojn de la vortoj.

MK: *De vespere geamantoj malpaciĝas – antaŭludo por amora nokto prepariĝas*. Krome, estas tre malnova proverbo je la temo: *Post milito venas paco: al geedzoj sur matraco*.

AG: Ambaŭ variantoj transdonas la ideon de la proverbo. Tamen! La unua varianto antaŭvidas nur vesperan malpacon, pri tiu limigo en la proverbo ne temas. Ambaŭ variantoj tro malproksimen, ĝis la matraco, impetas ne laŭ la rusa proverbo, kiu diras nur pri interŝanĝo de koleraj vortoj kiuj ne rezultigas malpacon (sed nur provizorajn emociojn).

VL: *Geamantaj kvereloj nur ĝuigas iliajn orelojn*.

AG: Tre bona traduko! Se iu volus perfektigi (kio eblas) ĝin, faru la frazon pli mallonga. La vorto “iliajn” pezigas la koncizon, la melodion. Ĉu ne pli bonus anstataŭigi la vorton *iliajn* per la artikolo *la* – tuj aperas la bezonata proverba melodio. Pri la grave interesega rolo de la artikolo en e-to temos iam estonte.

SK: *Kverelo de geamatoj – amuzludo por rebonigo (de familia vivo) – preludo*; aŭ *Geamatoj per kvereloj amuzas sin kaj liberiĝas de rutin*.

AG: Tamen kaprompa tasko: kiu vorto pli bonas: ĉu *geamantoj*, ĉu *geamatoj*? Se danci de la rusa vorto, do pli bonas *geamatoj*, ĉar la vorto *милый* tradukiĝas *ĉarma*, *aminda* en vortaroj, kiuj ne ekskluzive ĉefas por tradukisto. Inter la vortoj

*amato, ĉarma* kaj *aminda* estas palpebla diferenco, kaj neniuj el ili fidele (laŭ mi) transdonas la sencon de la rusa *милый* (eble *karulo?*). Feliĉe oni tradukas ne vortojn, sed frazojn, enhavon, ideon ktp. Ĉi tie la unua varianto tro pezas (pro la emoklarigi) kaj senrimas. La dua estas bone rimita, sed iom malproksimas de la rusa nepra senco en la ŝlosila vorto *мешатся*.

KI: *Geamantoj kverelas – la enuon forpelas*; aŭ: *Geamantoj konfliktas – distriĝem’ tion diktas*.

AG: La unua varianto estas bone rimita kaj parte transdonas la sencon. Neĝuste ŝlosilas la vortoj *kvereli* kaj *enuo*.

La dua – pli taŭgas kun la escepto, ke la vorto *diktas* estas iom scienceska, ĵurnalista, kiu rompas la popolecon de la esprimo. Ankaŭ *konfliktas* (tempo-longa ago) estas pala respegulo de pliforta mallongdaŭra emocio sub la rusa vorto “бранятся”. Ambaŭ variantoj estas bona bazo por iri al pli perfekta tradukaĵo. Pro la sufiĉa kvanto de la tradukantoj mi mem ne partoprenas tradukante. Sed sub la emocioj de nekontento pri la tradukoj el mia e-menso subite elvenis la jena esprimo: *La gekaraj kolervortas – nur plezuron por si portas*. Bonvole sendu al mi same amikajn kritikajn rimarkojn, ĉar nenio en la mondo estas tutece perfekta, ĉion ajn eblas perfektigi.

Intertempe venis de du personoj aldonaj tradukvariantoj al la unua proverbokvino. Nenio malhelpas publikigi ankaŭ ilin.

AS: *Ĉe laboro senŝvita – fiŝ’ ne estos kaptita*.

AG: Tute bona traduko! Estas transdonita la duala percepto: laboro-ŝvito.

AS: *Kudrilo estu via brako – kaŝita ĝi en fojna stako*.

AG: Laŭ mi estas mistraduko ne transdonanta la proverban esencon. La unua duono de la traduko estas brila komenco por iu nova proverbo. Ekz.: *Kudrilo estu via brako – aperos da flikaĵoj stako...*

KI: *Kudrilo serĉata en fojnamaso faras abundon da embaraso*.

AG: Bona varianto. Sola alkroĉiĝo estas tre nuanca. En la rusa la diraĵo estas imperative-konstata kaj ĉe KI – pure konstata. Ĝi ne taŭgas por ekz. transdoni la spiriton de la rusa: Ну вот! Теперь ищи иголку в стоге сена...

AS: *Aleno en sako – manĝaĵ’ en stomako*.

AG: ??? Ĉu la tradukanto estis tiom malsata, ke la manĝaĵo tutegale elsaltos kiel aleno el sako?.. Malfacilas la diven’ – nuras ajna miskompren’! Ho, fakte, post ĵusdiritaj rezonoj, mi rapide komprenis la tradukanton. Tre plaĉis al mi la tute ĝusta, sed ankaŭ tute humura percepto de (aliro al) la rusa proverbo. Nia kolektivo bezonas AS-on kaj liajn humurajn tradukojn. Mi menciis la nocion “kolektivo” ĉar nome tion mi nun organizas. Nin unuigas la ŝato al la rusia saĝo proverbe esprimita, ni ĉiuj (ankaŭ mi) deziras lerni la tradukarton, ni ĉiuj deziras peri la rusan kulturon (perproverban) al aliaj nacioj. Mi menciis min organizanto, sed ne gvidanto, kaj facile transdonos mian komentistan rolon al alia, kiam tiu evidentiĝos. En nia kolektivo enestas ankaŭ Garik Kokolija, kiu volantas disponigi la paĝojn de la revuo por nia laboro.

AS: *Se plumo naskis vorton – hakiĵ’ ne portos morton*.

AG: La traduko sufiĉe plaĉas al mi. Nur, se fajne aliri la rusan proverban ideon, la vorto “porti” estas sufiĉe malaktiva esprimilo de la rusismo, kiu egale donas ŝancon kaj skribi kaj haki, sed ne porti. Krome, porti – al kiu? Laŭ mi (erarpova) ne nepre al la skribita vorto sed al io alia *hakilo portas morton*.

KI: *Por murdi skribitan vorton hakilo ne havas forton*.

AG: Tre bona traduko! Se forpreni la gramatikan rusismon (*por*) iĝos eĉ koncize-elegante: *Murdi skribitan vorton hakilo ne havas forton*.

KI: *Devigu stultulon preĝi al Dio – frakasos li ostojn de sia kranio*.

AG: Estas bona traduko, sed eblas pli bone, se montri per uzi la vorton “frunto”, ke la rusaj preĝante (preskaŭ) tuŝas la plankon per frunto, sed ne per aliaj partoj de la kranio.

### **Libera tribuno**

KI: *Anatolo, mi volas diri al vi, ke vi pravas: alia lingvo – alia homo kaj rilate al Esperantio tio tre bone videblas – ĝuste Esperanto montras tion, kiel, eble, neniun nacian lingvon. Esperanto faras homojn pli bonajn – verŝajne dank’ al sia internacieco, kiu sugestas komprenon de iu alia ne nur alilingva, sed ankaŭ ĝenerale mal-simila, nekutima, kun aliaj vivperceptoj kaj vivmaniero. Tio timige mankas al multaj unulingvanoj. ... Inter esperantistoj estas multe pli bone ol inter la neesperantistoj – dank’ al Esperanto. ...*

La trafan (laŭ mi) opinion de Klara mi konfirmas per la opinio de Irina Gonĉarova, esprimita 9 jarojn pli frue: *Somere 2000 ĉe kunveno de aktivuloj en IvERo (apud Ivanovo) ties ĉeforganizanto Tanja Loskutova demandis ĉiujn: “Kial vi ĝis nun ne forlasis E-movadon?”. Estis tre interesaj respondoj. Sed mi memoras tiun de Irina: “Mi sentas min en la movado kvazaŭ mi sidas en ovoŝelo – estas al mi varme kaj agrable. Mi estas en mia medio... Sed jen mi elŝovas la kapon kaj vidas kio okazas ĉirkaŭe... Mi terurigas, mi rapide reenŝoviĝas. Kaj denove mi spertas varmon kaj agrablon. Kial mi forlasu tion?”* (REGo, № 5, 2001, p.1)

SK: *Mi provas traduki la proverbojn. Mi scias ke mankas ŝlosilaj vortoj kaj la rusa spirito. Nefacila estas la tasko, sed interesa. Netaŭgajn variantojn ne necesas publikigi.*

AG: Netaŭga varianto venis nur de samideano S.Tuljaĥov (enestis lingvaj eraroj). Aldone lia letero malfruiĝis por esti menciita en la respektiva n-ro de *REGo*. La netaŭgajn materialojn, en la senco ke mankas la rimoj aŭ ŝlosilaj vortoj, mi, por ke la aŭtoro sciu, dume mencias. Sed baldaŭ la netaŭgaj tradukvariantoj ne plu publikigos. El la nunaj tradukantoj plej bezonas e-lingvan legadon Marina Kocarj kaj iom Anatolo Surnakin. Fakte Marina povas altradukigi la tutan e-klubon en Krasnodar. Se oni volas alproprigi la lingvon Esperanto oni multe legu en ĝi kaj parolpraktiku. Oni legu (ideale parkerigu) e-poeziaĵojn. Sen eksenti la e-lingvon mal-facilas ĝuste transdoni la rusan pensokosmon.

Por doni sufiĉe da tempo pripensi la proverbojn kaj ties tradukaĵojn mi trovis jenan artifikon. En la aŭgusta numero ni ne traktos la tradukaĵojn, estu somera ferio. Sekve la sube donatan porcion de la proverboj vi “tradukmaĉu” duoble pli da tempo kaj mi tion ricevu antaŭ la 15-a de septembro. Ekde nun vi havos tutan du-kaj-duonmonaton por la pripensado. En la aŭgusta *REGo* publikigos nur la prover-

bokvino por la decembra-numera komento.

**Konsiloj.** Antaŭ ol traduki proverbon kreu kelkajn ruslingvajn situaciojn kie uzeblas la proverbo. Ĉe ajndubeto demandu al aĝuloj la koncernajn situaciojn. Nepru rimoj kaj laŭeble la ŝlosilaj vortoj. Post la unua provo traduki ĉion lasu kaj forgesu por kelka tempo. Poste refreŝa daŭrigu la cerbumadon.

1. Речист, да на руку нечист.
2. Голь на выдумки горазда.
3. Кто до денег охоч, тот не спит и ночь.
4. Лучше воробей в руке, чем синица в небе.
5. Муж и жена одна душа. (Suflo: peru al alinacioj, ke tio postulas tempon da kuneco.)

Alsendu rusajn proverbojn, kiujn vi ŝatus vidi tradukataj.

*Anatolo Gonĉarov (Krasnojarsk) <anatolog@mail.ru>*

---

## LA KAVO DE LA MALSAĜULOJ

---

*Jen estas anekdoto pri la malsaĝuloj de Ĥelem (urbeto en orienta Pollando, kie dum jarcentoj loĝis multaj judoj; laŭ la juda folkloro ili estis "tute ne saĝaj").*

En la ĉefa enirejo al Ĥelem estis granda kavo meze de la vojo. Kiam la ĉaristoj kaj kaleŝistoj veturis tie nokte, la veturilo ĉiam eksaltis kaj tiam la pasaĝeroj ege suferis. Kelkfoje ili vundiĝis pro la batoj kaj tiam oni devis transporti ilin al malsanulejo. Kelkaj homoj eĉ mortis rezulte de tiu ĉi kavo.

Iun tagon la urbestro kunvenigis la urban Konsilion de Saĝuloj por trovi solvon al tiu ĉi obstaklo.

Tiam diris la direktoro de la malsanulejo:

"Mi proponas starigi postenon de kuracisto ĉe la kavo por ŝpari la tempon de la veturigo al la malsanulejo kaj per tio savi vivon de multaj vundotoj."

Respondis la urbestro: "La ideo estas bona sed ne sufiĉe bona."

Diris la urba defend-oficiro:

"Mi proponas starigi ĉe la kavo, dum 24 horoj, ĉaron kun la plej rapida ĉevalo, por ke ĝi rapide transportu la vunditojn al la malsanulejo kaj per tio savu ilian vivon."

Respondis la urbestro: "La ideo estas bona sed ne sufiĉe bona."

Diris la urba inĝeniero:

"Mi proponas konstrui novan malsanulejon apud la kavo. Tiel ni savos vivon de multaj homoj."

Respondis la urbestro: "La ideo estas bona sed ne sufiĉe bona. Mi havas pli bonan ideon: Plenŝtopi tiun ĉi kavon kaj fosi novan kavon proksime de la malsanulejo."

*juda humuraĵo de Josef Shemer*



La 31-an de majo 2010 en Jekaterinburg juna studentino Arina Osipova diplomiĝis pri la temo “Propedeŭtika rolo de Esperanto en lernado de la germana lingvo”. Ŝi studis en la Urala Ŝtata Pedagogia Universitato (UŜPU), instituto de fremdaj lingvoj.

Kiel rakontis mem Arina, jam profesia instruistino de la germana, ŝi lernis Esperanton antaŭ kvar jaroj, kaj kiam venis la tempo elekti temon de la diplomverko, ŝi decidis kunigi Esperanton kaj la studadon. Arina multe interesiĝas ĝuste pri propedeŭtiko, tial komence ŝi volis pristudi nur ĝin – kiel Esperanto ĝenerale helpas lerni lingvojn. Sed la dekanino de ŝia fakultato estis ege kontraŭ Esperanto (“En la mondo estas tro da problemoj pri la normalaj lingvoj, kaj vi alŝovas la artefaritan!” – citaĵo). Do laŭ la dekanino oni povas okupiĝi pri Esperanto nur hobi-nivele.

Tial la baza problemo estis trovi sciencan gvidanton de la diplomverko – pedagogoj en UŜPU jen timis la temon ĉar nenion sciis, jen ne vidis sencon okupiĝi pri tio. Klariĝis ankaŭ, ke inter la lingvistoj ekzistas opinio, ke la propedeŭtika rolo de Esperanto estas memevidenta kaj oni ne devas ion ajn pruvi ĉi-rilate. Krome laŭ ili ne necesas enkonduki Esperanton en altlernejojn kiel devigan studobjekton, ĉar la latino tute bone plenumas rolon de Esperanto.

Post la diplomiĝo Arina ankaŭ intencus fariĝi aspiranto, sed kun ĉi tiu temo la afero estas malrealo. Ŝi diris, ke antaŭ jardeko iu en UŜPU provis skribi sciencan verkon pri Esperanto, sed malsukcese. Kiel la gvidanton Arina ricevis instruistinon de la franca, kiu iam lernis Esperanton, sed rilatas al ĝi neserioze kaj krome ne regas la germanan (pri kiu ĉefe temas en la verko de Arina). Tial Osipova devis fakte labori memstare, la gvidantino helpis nur pri stilaj nuancoj kaj organizaj aferoj.

Arina laboris dum du jaroj. Pasintjare ŝi analizis la E-rusan vortaron de A.Ŝevĉenko, kaj krome uzis etimologian vortaron de Esperanto, serĉante germanajn radikojn en E-vortoj. Osipova faris jenan eksperimenton: ŝi proponis al 22 esperantistoj kun malsama E-lingvokono kaj nenioma rego de la germana dum 45 minutoj traduki el la germana apartajn vortojn, frazojn kaj malgrandan tekston. Rezulte de la traduka laboro evidentiĝis, ke la hipotezo pri la propedeŭtika valoro estis plene konfirmita kaj la celo – atingita.

Osipova ricevis plej altan poenton, la recenzo estis pozitiva, sen korektoj aŭ rimarkoj. La atesta komisiono ĝenerale rilatis neŭtrale, sed faris bazajn demandojn – kial Esperanto sed ne la angla, ĉu Esperanto helpis lerni la germanan, ĉu Esperanto estas ie lernata kiel studobjekto. Krome oni petis ke Arina diru ion en Esperanto.

Do la brava Arina Osipova meritas admirojn pro persistemo, gratulojn pro la diplomiĝo kaj dankojn pro kontribuo al diskonigo de Esperanto inter lingvistoj.

**Grigorij Arosev (Moskvo)**



## NI LUDU!

Tiamaniere la fremdlingva fakultato de Uljanovska ŝtata pedagogia universitato kaj Esperantoklubo invitis urbajn loĝantojn al la 8-a Lingva Festivalo. La invito estis farita per radio kaj kelkaj ĵurnaloj, per specialaj faldfolioj kaj per ruslingva ĵurnalo “Verda Teo”, kiu kutime aperas antaŭ festivaloj. Tie oni rakontas pri la festivaloj kaj E-

*du Maŝa-j prezentas la flagan alfabeton*  
kluba agado. Ĉiu festivalo estas dediĉita al iu temo. Ĉi-foje temis pri naciaj ludoj. Partoprenantoj povis ludi dum prezentoj de pli ol 40 programoj. Precipe sukcesis ludoj, preparitaj de Centro de mordva kulturo.

Gaja estis prezentado de flaga alfabeto, kiun brile organizis studentinoj Marija Kondratjeva kaj Marija Matvejeva. Ili ellernis tiun “lingvon” dum Lingva Festivalo en Ĉeboksari kaj jam triafoje instruis dezirantojn. Ĉi-jare ili finos studi en la universitato, tamen ili jam preparis anstataŭantojn.

La unuan fojon estis prezentitaj la oseta, la nepala kaj la persa lingvoj. Nia gasto el Moskvo Loj Timle memorigis al ni pri la pola lingvo.

Certe, la urba E-klubo estis aktiva. Jurij Karcev, Sergej Abramov, Dmitrij Semjonov estis gvidantoj tra la lando Esperantujo. En la Esperanto-salono oni povis ankaŭ rigardi albumojn pri kluba agado, fotojn, faritajn de ĝiaj membroj kaj niaj geamikoj el diversaj urboj, librojn kaj multajn esperantaĵojn. Krome niaj klubaninoj Olĝa Sirotinina kaj Elĵmira Kuĉatova prezentis la italan kaj la tataran lingvojn.

Endas diri, ke tri tagojn antaŭ la festivalo okazis “Aŭstriaĵ Tagoj en la Uljanovska ŝtata pedagogia universitato”. Studentoj kaj instruistoj de la fremdlingva fakultato akceptis gastojn el Aŭstrio: Norbert Habelt, Aleksandr Burka kaj Iris Hoheneder. Ili partoprenis la festivalon. Dum la festa malfermo ili salutis la publikon diverslingve, ĉar ĉiu el



*dancas la ensemblo “Van”*

ili parolis kvar-kvin lingvojn. Bedaŭrinde, dume ne Esperante. Poste ili prezentis sian landon.

La plej aktivaj estis studentoj de la germana fakultato, kiuj prezentis ne nur germane parolantajn landojn Germanion, Aŭstrion, Liĥtenŝtejnon, sed ankaŭ la ĉuvaŝan, la tataran kaj aliajn



*tea ceremonio en E-klubo*

lingvojn. La estrino de la germanlingva katedro Olĝa Rtiŝĉeva interese rakontis pri sia vojaĝo al Grekio. En teatra salono estis montrita fabelo de fratoj Grimm.

Niaj konstantaj helpantoj estis studentoj el la urba sociala-pedagogia lernejo №1 sub gvido de Tatjana Lebedeva kaj studentoj de la teknika universitato kun Olĝa Dmitrijenko (ambaŭ estas niaj eksstudentinoj).

Tradician koncerton partoprenis niaj malnovaj geamikoj, ekzemple la danca ensemblo “Van” (Unio de rusiaj armenoj), kiu post kelkaj tagoj festis sian kvinjaran jubileon, en kiu E-klubanoj estis gastoj.

Revenis el la armeo Dmitriĵ Porfirjev. Nun li instruas sporton en lernejo kaj dum libertempo gitarludas. Ni povis aŭskulti lin dum la adiaŭa koncerto.

Pri nia festivalo ankaŭ eksciis studentoj kaj instruistoj de pedagogia lernejo en Tetjuŝi (Tatario) kaj proponis sian programon. Dum solena malfermo sonis rusaj, tataraj, mordvaj, ĉuvaŝaj kantoj en ilia plenumo.

La duan tagon estis la unua leciono de Esperanto (Jurij Karcev) en Palaco de Libroj, kie situas la urba klubo. Krome estis montrita filmo por komencantoj. Poste ĉiuj povis ĝui en la E-klubo ĉinan te-ceremonion, pri kiu nin informis Andrej Petrov kaj Lidija Pehtereva.

Niaj gastoj dum du tagoj tradicie estis ĉeboksaranoj Tatjana Nikolajeva kaj Jevgenij Belkin.

Nun en la klubo funkcias jam du malgrandaj grupoj (Sergej Abramov kaj Margarita Karceva kiel instruistoj): dimanĉe, kiel kutime, kaj merkrede, ĉar ne ĉiuj povas viziti kursojn ripoztage pro longa vojo. Ĵaŭde pri Esperanto okupiĝas daŭrigantoj, gvidataj de Jurij Karcev. Ni esperas, ke niaj vicoj plimultiĝos dank’ al Lingvaj Festivaloj.

**Margarita Karceva (Uljanovsk)**

*fotoj de Julia Sivorotkina kaj Stepan Korsakov*



## **KOREIO**

Sed kiam ŝi ekmontras koketemon, ĉiam mi tuj fariĝas **indiferenta kvazaŭ mal-juna arbego sur montopinto**.

*Bak Giŭan, tr., La Espero el Koreio, 1992, 1, p. 4*

En la unua tago kutime hezitema kaj hontema li daŭre restas **sola** ĉe salonangulo **kiel ŝrumpiĝinta silkraŭpo**. Sed jam de la dua tago li energie iradis tien kaj ĉi tien, kaj fine saltadis, flugis...

*Sin Gjong-sik., or., La Espero el Koreio, 1994, 5*

Li estis tre malriĉa. Por **gajni vivorizon** li ĉiutage iris profunden de la arbaro kolekti lignojn...

*Choe Taesok, tr., La Espero el Koreio, 1992, 2, p. 12*

Emfazo devas esti sur “honesto”, ĉar en tiu ĉi jaro estas tre grave, ke vi ne submetiĝu al via kutima tendenco **fleksi la veron**. Se vi faros tiel...

*Bak Giŭan, tr., La Espero el Koreio, 1992, 1, p. 11*

Se vi estas Tigro, estu dankema, ke vi havas tiel fortan **senton** de sendependeco, ĉar **ĝi faros vin neŝancelite antaŭeniri** tra kelkfoje malesperigaj tempoj en tiu ĉi jaro...

*Bak Giŭan, tr., La Espero el Koreio, 1992, 1, p. 9*

Dum la guberniestro **ricevis siajn gastojn** kaj prezidis la feston...

*Cho Sung Ho, tr., Koreaj rakontoj (Ĉunĝjang, Seŭlo, Korea resp.), 1976, p. 22*

Mi **karexis mian malkontentiĝon per penso**, ke estas nur tri tranĉiloj.

*Choe Taesok, or., La Espero el Koreio, 1993, 2, p. 13*

La **spirito kaj ĝojo** de la popolo de Goguryo **estis levitaj ĝis la fino de la ĉielo**.

*tr., La Espero el Koreio, 1988, 7, p. 8*

La reĝo intencis establi la bazon de la militistaro ĉirkaŭ la **buŝo de la rivero Ab-rok**.

*tr., La Espero el Koreio, 1988, 7, p. 7*

Sekvis fare de Choe Taesok la prelego pri vojaĝo al Finnlando kaj Orienta Eŭropo, kiu orientigis kaj instigis la ĉeestantojn aliĝi al la Tamperea UK en 1995. Do **komenco kuntiras finon**.

*or., La Espero el Koreio, 1994, 5, p. 12*

**Post la spuro de** So Gilsu, d-ro kuracisto Kim Yung-myung el la UK en Valencio alvenis, portante al vjetnamiaj esperantistoj...

*or., La Espero el Koreio, 1994, 5*

Ni koreaj esperantistoj **ĉeestis** [temas pri UK] **kun granda atentoklino...**

*tr., La Espero el Koreio, 1993, 3, p. 10*

---

<sup>1</sup> La antaŭaj partoj aperis en REGo №№ 2 (51) – 6 (55), 2009; 1 (56) – 2 (57), 2010.

Mi do estu en loko aŭ ĝojiga aŭ suferiga. Kun ĝi mi ja volontos dividi plezuron kaj malĝojon. **Ĉar ju pli dividita, des pli granda la ĝojo, kaj des pli eta la sufero.**

*tr., La Espero el Koreio, 1993, 1, p. 4*

La regataro deziras, ke la **regadenhavo** de la nova prezidento estu multe alia ol tiu de pasinta prezidento elmilitista.

*tr., La Espero el Koreio, 1993, 1, p. 4*

Renkonti novajn kaj malnovajn geamikojn el la tuta mondo estas **korbatege ekscita afero**, kaj en tio ne mankas heroldoj, kiuj alportas novaĵojn.

*or., La Espero el Koreio, 1994, 5, p. 19*

... sur kies deklivo multege pli longa oblikva kaj danĝeraspekta sledglitis mi kaj Rejna **duope, surmetante la komunan sorton.**

*Choe Taesok, or., La Espero el Koreio, 1993, 1, p. 7*

La esprimo “**kiu aŭdacas kraĉi sur la ridantan vizaĝon!**” kaj “**al ridoplena hejmo venas ĉia beno**” bone montras al ni, kiel grava la rido estas por nia vivo.

*or., La Espero el Koreujo, 1986, 6, p. 3*

Nun ĉina ekonomio estas sukcese transformiĝanta al “merkata ekonomio”, kaj **al ni aspektas ke Ĉinio estos la plej granda ekonomio en la mezo de 21-a jarcento.**

*Lee Chong-yeong, or., La Espero el Koreio, 1994, 4, p. 5*

Ĉu ne diras niaj proverboj, ke **rizospiko klinas sian kapon des pli malsupren, ju pli matura kaj granda ĝi estas...**Vidu, dum la rizospiko klinas sian kapon, sen-grena riztrunketo rigide altigas sian kapon.

*tr., Mondo de Universitato, 1990, 6, p. 4*

Mi vekigis je la naŭa, ĉar hieraŭ ĝis malafrua nokto **floris la babilado kun** Maria, kiu venis...

*Choe Taesok, or., La Espero el Koreio, 1993, 1, p. 7*

Iun tagon ŝia edzo trovis grandan bulon de oro dum li hakis arbojn en la montaro. Li tre ĝojis pro la oro, sed ankaŭ timis, ĉar lia edzino sendube **elbabilos tion en ĉiu direkto.**

*Choe Taesok, tr., Kontakto, 2000, 5 (179), p. 11*

Jam estis 24-a horo. Ĉiuj pasaĝeroj jam **morte silentis.** Noktaj silentoj regis en la vagono.

*Hong Hengwi, or., La Espero el Koreio, 1988, 5*

Kiam la japano prezentas sian opinion mondvaste, ĉu li ne pripensis, ke la mortigitoj de japanoj ne koleros? **Kiel ŝtonŝtopkapa!**

*Ahn Song-an, or., Monato, 1987, 1, p. 4*

## **KROATIO**

El la libro: *Moderna Kroata Prozo (Zagreb, 1979), tr., Roger Imbert:*

Sed la granda kaj rekonata simbolisto **blovis sin** pro la ŝuldoj Alĝerion, kaj... *p. 15*

Ne tiom gravas virinoj. Lasu ni tion. – Laŭplaĉe. – Se tiel, tiam bone memoru la diron: **Ĉenoj ligas ĉevalojn kaj bovojn, kaj la vortoj junajn kavalirojn.** –

Memoru kaj kondutu laŭ tio. *p. 22*

... sed kiam la papago blanka kun verda kaptufa plumaroantis sin hirtigi kaj gapi al li per dikaj **okuloj elkaviĝaj**... *p. 30*

Kiu rigardas ĉion tion, klopodas liberigi sin de la **malvarmaj tremetoj, kiuj trakuras sub lia haŭto**... *p. 41*

Kiam en **unu subito** Stana ekĝemas kaj ĵetas sin al la kolo de la edzo (*ruse: в одно мгновение – rim. de AG*). *p. 61*

Aj, haaaaj... fraaa... li elsputas longe kaj **gaplarĝigas la okulojn**... *p. 255*

Iam Ivan havis ankaŭ patron! Li **puŝis fumojn el sia pipo**, odoris je la fervoja stacio en kiu li laboris... *p. 268*

... he – li daŭrigis ebruike kaptante ŝin peze ĉirkaŭ la talio... – **kien la larmo, se ne al okulo, kien du afliktitoj se ne kuniĝas**. *p. 271*

La knabo silentiĝis. La vortoj de la avo ankoraŭ pli forte soligas lin, kaj la nun jam pli malofte-senhelpe sinaŭdigo konstantigis en li la timon kaj la malcerton: hodiaŭ okazis io neordinara!.. **Li silentis kaj deziris malaperi en la silento**. *p. 290*

Mi ne deziras neniigi la mondon. – Ne deziras? Sed ĉu estas eĉ unu jarcento kiun vi ne traŝiris per tranĉilo kaj kribrigis per kugloj. **Tio ne estis vortoj, sed ja viaj kvin fingroj ĉe la faro**. *p. 305*

Vidu mizerulo, rigardu senhavulo kurtabraka, **elrondigu la okulojn**, povro sen-spirita... *p. 323*

La vilaĝestro **montris fingre la frunton** kaj flustris al la sinjoro apud si: – **kun pardonpeto**, sed turniĝas iom en lia kapo jam de l' infaneco. *p. 327*

... kaj mi aldonis: – kaj ankaŭ Ĵarko Sirotiĉ en la lasta Vi kredis, **Griŝe alĉieligis la hufojn**, ha, pesto dia. *p. 359*

Vi deziras vin liberigi de mi nun. Tute subite vi serĉas kaŭzojn! – Ĉesu, ŝtopu ĝin, **forperdu vin!** *p. 370*

... tempo ne montris sufiĉe da diligenteco... Mi rigidiĝis, ĉio malklariĝis en mia kapo, **ekplaŭdis min la sango**. *p. 373*

Sed li kaj la sekretario **estas kune kiel fingro kaj ungo**... *p. 378*

Venis la vera fino por nia rilato... Kaj mi, kaj ŝi, sed ŝi, jen, transpasis la mezuron, al pensiulo? Ta, eĉ mi **“dube lumetis” por ŝi**, do des pli tion faros pensiulo. *p. 379*

... sed ĉe la nura ekpenso pri la oficejo mi ekbrulas denove, iu helico komencas zumi, **en miajn manojn eniras formikoj**, la spirritmo rapidiĝas... *p. 382*

En la entreprenon venis nova kamarado. Ĉiuj diras, ke li estas bona kaj funde faka! Ni vidos. **Ĉiu gasto tri tagojn bonvenas**. Sed li ne estas gasto. *p. 385*

Eble la nano estis kun ŝi en intimaj rilatoj, eble ŝi **ĵetis al li pulon en la orelon misrakontante** al li ke la forpasinto forprenis de ŝi la virgecon. *p. 402*

Ĉiesulinoj, estas kara mia, plej ofte plej etsaĝaj kaj kiam vi surprizas ilin en la ĝusta momento, ili kondutas kiel infanoj: vi kontraŭ bombono **ricevos tian kon-**

**feson ke via haŭto hirtiĝos.** p. 406

... ha, ha, ha – stumblis la patro en la rido kaj **tiris la vizaĝon en serenon**: la faltoj longiĝis... p. 408

... la patro tranĉis la parolon kaj skuis la kapon, tiam kuŝigis la mentonon sur la bruston. Mi dampis mian spiron en **la silento kiu dissternis sin ĉirkaŭ ni**. p. 408

Ŝi sorbis en sin la bruegon de la foiro... aŭskultante la **kriadon kiu sternis sin** sub la drinkejaj tendegoj... p. 430

... ekstere estis **mortsilente kiel en neĝa fosaĵo**, sed... p. 445

Jes, – ŝi respondas maltrankviligite tuj denove **ĉe la rando de esploro**... p. 450

... sed Drago prenis ĝin [urnon] de mi kaj elportis sur la terason flanke de la maro. De tie ŝi subite ekfrapetis ĉe la kuireja fenestro, montradis kun **ronde diskirlaj okuloj** tra la koridoro al la ĝardeno, pro la fortega fetoro de tiu urno anoncis al mi pli... p. 452

Ne opiniu ke la patro plendas pro peza laboro. **For de tio**. Li nur diras, ke...

*Marinko Ĝivoje, tr., Fonto, 63 (mar.1986), p. 21*

Kaj tage **la suno brulis tiel ke la birdoj oscedis**, la bestoj senvole ĉirkaŭmarŝis...

*Zlatko Tišljarić, tr., Koko, 1989, 6 (nov), p.17*

La malĝojo ne volis endormigi min. Mi ellitiĝis kaj serĉis la poemon kiun li tradukis. En ĝi kuŝis la verso, kiun mi neniam antaŭe vidis: “kaj **verdo via restos senaŭtuna**”.

*Spomenka Štimec, or., La Espero el Koreio, 1993, 1, p. 18*

La fratino de Pero haltis en la koridoro kaj rigardis en la ĝardenon. Sube kreskis herboj, sed la **rigardo pendis tie super la herboj**.

*Spomenka Štimec, or., La Espero el Koreio, 1993, 1, p. 17*

Sen la intuicia kompreno de Zamenhof pri tio ke **lernolibra iniciato** fariĝas lingvo nur se ĝi funkcias ankaŭ kiel identigilo...

*Zlatko Tišljarić, or., Esperanto, 1997, 4, p. 69*

Mi alportis en la valizon miajn plej belajn subvestojn. Mi pakis **por foriri el la hejmo, la abiturientan ekzamenon malantaŭ mi**. Mi decidis studi la francan.

*Spomenka Štimec, or., Monato, 1998, 5, p. 23*

... li fakte konservis mian tutan korespondadon ekde la jaro 1965. En **miaj unuaj leteroj frostiĝis miaj unuaj gramatikaj eraroj**...

*Spomenka Štimec, or., La Gazeto, 81 (mar. 1999), p. 7*

Kreskis la preparoj por UK en Zagreb, **la laboro densiĝis**, la kunsidoj multobliĝas.

*Spomenka Štimec, or., Tempo, 2000, dec. p. 2*

Nun nia eksprezidento **volis imiti lin, sed li ne atingis liajn genuojn**. Li ne povis imiti Tito'n, sed li volis...

*Zlata Flego, or., La Gazeto, 91 (jan. 2001), p. 12*

*elnotis Anatolo Gonĉarov (Krasnojarsk)*

## EVENTORIĈAJ TAGOJ

Fino de la dua aprila semajno estis eventoriĉa.

**Unue**, finfine aperis la kantaro “Ŝatataj kantoj dulingve”. Tie estas kolektitaj ruslingvaj kantoj, libere tradukitaj en Esperanton fare de nia klubanino Tatjana Kuzjmina. Nia triopo (Tatjana Kuzjmina, Tatjana Jevina, Irina Grebeŝĉenko) jam kantis ilin dum VER-14 kune kun niaj konatinoj el Jaroslavl Svetlana Dudaleva kaj Oljga Kiseljova. Ofte nin akompanis harmonike Vjaĉeslav Suslov (Samara). Ankaŭ julie 2009 nia teamo kantis kelkajn kantojn dum TEMoj (Tiĥvin) kun Miĥail Povorin. Kaj jen, redaktitaj de Jurij Karcev, ili aperis kiel proveldono.

**Due**, Jelena Tubalec preparis faldfoliojn pri nia urbo. Tio estas “la unua hiruso”, ĉar baldaŭ ni povos ekvidi la aliajn. Oljga Terentjeva, Oljga Sirotinina pripensas variantojn.



**Trie**, ni ree renkontiĝis kun niaj amikinoj el Dimitrovgrad. Planita estis leciono de M.Karceva. Oni elektis la temon “Urbo”, ĉar ĉiu renkontiĝo kutime komenciĝas per rakonto pri urboj, el kiuj alvenas partoprenantoj. Kaj niaj kluboj dezirus vojaĝi ĉi-somere al Krasnodar kaj Niĵnij Tagil. La leciono okazis vendrede en la universitato por pliaĝuloj “Sofia”, pri kiu jam temis en REGo (№ 5 (54), 2009). Ni prilaboris tekston de nia amiko Bronislav Ĉupin pri lia urbo Ijevsk. Li ankaŭ sendis al ni bildkartojn pri Udmurtio, kiuj estis montritaj dum la leciono. La partoprenantoj povis aĉeti la ĵus preparitajn kantarojn kaj ricevis donace faldfoliojn pri Uljanovsk kaj tekston pri Ijevsk.

Poste ĉiuj vizitis urban teatron, kie ni spektis la teatraĵon de S.Mroĵek “Hemeralopia”, prezentitan de la uljanovska teatra studio “Enfant – Terrible”. Ple-naj da impresoj ni ĝuis agrablan vesperon parolante kun prezidanto de la klubo “Verda suno” Tatjana Iljutkina pri niaj kluboj, pri komuna laboro, pri novaj projektoj.

La sekva tago komenciĝis frumatene, ĉar jam je la naŭa horo alvenis uljanovska kvaropo. Post mallonga teumado komenciĝis laboro: Galina Aleksejeva (Uljanovsk) lernis kun ambaŭ teamoj la novan ludon “Betulo”. Ljubovj Zajceva (Uljanovsk) ripetis jam konatan ludon pri nombroj. Plue ni ellernis novan kanton el la kantaro de T.Kuzjmina. Tio estis “Samara la urbet” kiel rememoro pri VER kaj VEReto. Tiamaniere niaj geamikoj el Samara kvazaŭ kunestis.



Nia dua fotoekspozicio “Urbaj motivoj” plaĉis al la dimitrovgradanoj. Des pli ke ĝin partoprenis du el ili: Tatjana Iljutkina kaj Ljudmila Vasenjova. Nian trian ekspozicion pri katoj “Grandaj kaj malgrandaj, lanugaj kaj mallanugaj, tamen mir-

indaj kaj ŝatataj” deziras partopreni jam multaj. Poste ni koncertis. Kun granda plezuro ni aŭskultis “Nigrajn okulojn” en plenumo de niaj mastroj. Certe, esperantlingve. Sekvis du ruslingvaj kantoj. Ilin bonege kantis Marija Ĥafizova kaj Lidija Savanejeva (Dimitrovgrad). Fine oni kantis jam kune.

La duan parton de laboro komencis Marija kaj Lidija. Ili rakontis pri tiuj kvartaloj de la urbo, kie ili loĝas. Jelena Sirotinina (Uljanovsk) preparis kelkajn interesajn demandojn pri ambaŭ urboj.

La tria planita parto estis vizito al loka regionstuda muzeo. Interesa rakonto de muzea ekskursgvidanto Ljudmila Taratorkina impresis ĉiujn, kaj pri tio ni skribis en la gastlibro ruse kaj Esperante. Multaj fotoj estis faritaj dum la renkontiĝo.

Tiun eventoriĉan tagon kronis koncerto de simfonia orkestro jam en Uljanovsk. La tuta kvinopo – vizitintoj al Dimitrovgrad – kaj triopo de pli junaj geklubanoj aŭskultis francan muzikon. La uljanovskan orkestron direktis Daniel Kavka (Francio).

La renkontiĝo sukcesis laŭ opinio de la partoprenantoj. Mi ankaŭ devas diri, ke nia nejuna ambaŭurba grupo progresas, lernante Esperanton. La pleja gravaĵo estas: ili volas. Sekve, ili povos!

*Margarita Karceva (Uljanovsk)*

### **FORPASIŜ V.M.ĤMELINSKIŜ**

La 26-an de aprilo post longdaŭra malsano en la kliniko de la Instituto je la nomo de Sklifosofskij forpasis la gvidanto de la moskva klubo de esperantistoj-scienclistoj “Scio” Vadim Miĥajloviĉ Ĥmelinskij. Dum longa tempo li estis senlaca kaj entuziasma organizanto de sciencaj konferencoj, kiuj allogis ne nur esperantistojn, sed ankaŭ aliajn interesajn homojn. Helan memoron!

# Bulteno de REU

## DECIDOJ DE LA 25-a KONFERENCO DE REU

1. Taksi la laboron de la Estraro kontentiga.
2. Aprobi la Raporton de la Kontrol-revizia Komisiono.
3. Aboli la Provizoran Regularon pri la Konsilio de REU.
4. Elekti la Estraron de REU en la konsisto: Grigorij Arosev (Moskvo) – Prezidanto, Svetlana Smetanina (Moskvo) – Vicprezidanto, Vladimir Bespalov (Soĉi), Jurij Karcev (Uljanovsk), Rafija Kudrjavceva (Jekaterinburg), Darja Obrazcova (Sankt-Peterburg) – membroj.
5. Elekti la Kontrol-revizian Komisionon de REU en la konsisto: Oleg Ciganov (Sankt-Peterburg) – prezidanto, Gennadij Basso (Moskvo), Ljudmila Novikova (Moskvo) – membroj.
6. Elekti Komisiitojn: pri dokumentado – Viktor Aroloviĉ (Moskvo), pri buĝeto – Roman Bolšakov (Moskvo), pri retlistoj de REU – Georgij Kokolija (Moskvo), pri financoj – Valerij Sipoviĉ (Moskvo).
7. Elekti Nikolaj Gudskov (Moskvo) Komitatano A de UEA.
8. Rekomendi al UEA nomumi Svetlana Smetanina Ĉefdelegito de UEA en Rusio.
9. Komisii al la Estraro esplori proponojn, prezentitajn al la Konferenco.



*Darja Obrazcova, Grigorij Arosev, Rafija Kudrjavceva, Svetlana Smetanina*

*Sankt-Peterburg, la 30-an de majo 2010*

## TASKOJ DE REU-ESTARO, KOMISIITOJ KAJ HELPANTOJ POR LA KURANTA MANDATPERIODO

### *Movada (asocia) administrado:*

- eldoni Jarlibron (2010/2011);
- regule kompili kaj dissendi Bultenon de REU al membroj kiuj ne ricevas REGon;

- enkonduki novajn membrokategoriojn (min. 2);
- prizorgi refaradon de la retejo <reu.ru>;
- difini lokon de sekva REK aŭ/kaj REU-Konferenco.

**Novaj iniciatoj:**

- establi de la informservo “REU info”;
- lanĉi retejon <E-kluboj.ru>;
- prepari PDF-arkivon de REGo;
- krei REU-“klubojn” en la sociaj retejoj “VKontakte” kaj “Facebook” por faciligi novaj-aliron kaj kontaktojn kun REU por rusiaj esperantistoj;

- subteni teknike la retan version de la vortaro de Boris Kondratjev.

**Kontaktoj kaj diskutoj:**

- kontaktoj kun aliaj landaj E-organizoj cele establi laborajn rilatojn kun eventuala spertintersanĝo;
- kontaktoj kun eksaktivaj esperantistoj el la antaŭaj “generacioj” cele vigligi ilin kaj eventuale inviti al kunlaboro;
- amasa pridemandado pri okazigo de UK en Rusio kaj posta diskuto;
- amasa pridemandado pri la vortaro de B.Kondratjev;
- diskuti pri nova koncepto de la Libroservo;
- diskuti pri statuso de REK.

**Financa-administra flanko:**

- akcepti membriĝojn, enkasigi monon;
- fine de la jaro prepari financon raporton;
- difini sorton de la oficejo;
- prizorgi bankan konton;
- dungi portempan libroteniston por prepari bilancon por banko;
- esplori vojojn por mon-akirado (subvenci-petoj ktp).



*Vladimir Bespalov*



*Jurij Karcev*

## **MALFERMA TAGO SPITE LA CINDRAN NUBON**

Pli ol 70 partoprenantoj vizitis la 32-an Malferman Tagon de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 17-an de aprilo. Multaj estis malhelpitaj pro nuligitaj flugoj aŭ fortimigitaj de plenplenaj trajnoj sekve de la haltigo de aertrafiko pro la cindra nubo elspuita de la islanda vulkano.

La ĉefgasto estis d-ro Mark Fettes, asista profesoro pri edukado en la Universitato Simon Fraser en Vankuvero. Fettes prelegis dufoje pri Esperanto kaj la monda



eduka problemo, klarigante sian ideon pri UEA kiel unuavice eduka organizaĵo. Nora Caragea legis el *Pacrakontoj*, kiu estas jam la kvara libro de la germana aŭtorino Gudrun Pausewang en ŝia traduko. Rob Keetlaer prezentis sian retejon pri proverboj <www.proverbaro.net>. Sian agadon prezentis ankaŭ TEJO kaj E@I (Esperanto@Interreto), dum komitatano Johan Derks diskutigis interesitojn pri la utilo de reta decidfarado. Ankaŭ pluraj filmoj estis montritaj.

La Libroservo vendis sume por 2107,52 eŭroj. La ĉefa furoraĵo (8 ekz.) estis la nova *English-Esperanto-English Dictionary* de John Wells. De *Asteriks ĉe la olimpiaj ludoj* kaj la Tonkin-festlibro *La arto labori kune* estis venditaj po 6 ekz.

La venonta Malferma Tago estos sabaton, la 27-an de novembro 2010.

*Gazetaraj Komunikoj de UEA*

## **HAVANA UK SUPER PORTLANDO KAJ VANKUVERO**

Je la 4-a de junio la 95-a Universala Kongreso de Esperanto en Havano (17-24 julio 2010) nombris 931 aliĝintojn el 59 landoj. Sekve ĝi preterpasis en la historia statistiko du aliajn amerikajn UK-ojn: Portlando en 1972 (923) kaj Vankuvero en 1984 (802). Plej multe da aliĝintoj, 157, liveris la kongreslando Kubo. Sekvis Francio (112), Japanio (76), Germanio (70), Brazilo (65), Italio (43), Nederlando (32), Meksiko (30), Belgio (25), Pollando (22), Kanado (18), Britio (17), Danio, Kroatio kaj Litovio (po 15).

*Gazetaraj Komunikoj de UEA*

## **ESTRARA RAPORTO: PANORAMO DE LA ZAMENHOF-JARO**

15 ilustritajn paĝojn en la junia numero de la revuo *Esperanto* okupas la Estrara Raporto 2009, t.e. la raporto de la Estraro pri la agado de UEA en la pasinta jaro. Tiun dokumenton la Estraro devas liveri ĉiujare al sia supera organo, la Komitato, kiu surbaze de ĝi povas prijuĝi, kiel la plenuma organo de UEA sukcesis en sia laboro. En la 95-a UK en Havano la Komitato decidis pri la akcepto de la raporto.

Preparante la raporton ĉiu Estraro alfrontas la demandon, pri kio ĝi raportu. La Statuto de UEA lasas vastan liberecon, ĉar ĝi difinas nur, ke la Estraro “prezentas al la Komitato jarraporton pri la agado”. Laŭ la plej mallarĝa difino la raporto registrus nur tion, kion la estraranoj mem faris; laŭ la plej larĝa difino temus pri detala revuado de ĉio, kio okazis en la Esperanto-movado, kies ĉefa motoro UEA estas. Al la ĉi-foja raporto estas aldonita klarigo pri tio, kiel la Estraro mem konceptis la raporton: “Principe la raporto kovras la antaŭan kalendaran jaron, kaj ĝi traktas tiujn agadojn, kiuj estas rekte ligeblaj al la Asocio. Tamen, en la praktiko, estas foje malfacile distingi la agadon de la fakaj asocioj, aŭ eĉ de sendependaj institucioj, kiuj tamen proksime rilatas kun la Asocio. Tiu ĉi raporto do prezentas bildon de la agado de UEA en la kunteksto de la ĝenerala laboro de la Esperanto-movado, ĉefe dum la jaro 2009.”

La jarraportoj de UEA estis kaj estos utila fonto de informoj por ĉiu, kiu volas en facila maniero bildigi al si la tutan movadan panoramon en difinita jaro. Tial la Estraro plenumas ne nur sian formalan devon raporti al siaj elektintoj, sed ankaŭ la gravan, kvankam eble ne same evidentan rolon de kronikisto de la movado.

La Estrara Raporto enhavas ankaŭ la spezokonton kaj bilancon de UEA. Ili dokumentas solidan financon evoluon de UEA, kiu, malgraŭ la monda financa krizo, sukcesis teni la en- kaj elspezojn en ekvilibro por la kvara sinsekva jaro. La bilanco superis unufoje la mejloŝtonon limon de 5 milionoj, sumigante je 5.289.072 eŭroj.

La junia numero de *Esperanto* kun la Estrara Raporto estas senpage ricevebla ĉe la Centra Oficejo de UEA kaj legebla ĉe: <http://www.uea.org/pdf/Junia10Reta.pdf>.

*Gazetaraj Komunikoj de UEA*

## KOMITATANOJ B ELEKTITAJ

La 1-an de junio okazis en la Centra Oficejo de UEA la nombrado de la voĉoj donitaj en la elektado de ses Komitatanoj B por la periodo 2010-2013. Por tiu tasko la Estraro de UEA nomumis komisionon, kiu konsistis el la Ĝenerala Direktoro Osmo Buller kaj la individuaj membroj Rob Moerbeek, Piet Schuil, Francisco L. Veuthey kaj Atie van Zeist. La stabo de la Centra Oficejo asistis la komisionon en la nombrado, kiu daŭris iom pli ol kvar horojn.

La balotilo estis sendita al 4801 individuaj membroj, el kiuj voĉdonis 1550, t.e. 32,3%. Estis 1527 validaj kaj 23 malvalidaj balotiloj. La balot-aktiveco klare superis tiun de la antaŭa fojo en 2004, kiam 29,0% de la membroj voĉdonis, sed ĝi ne atingis la rekordon de 33,6% en 1998. Plej multe da voĉoj, 1010, ricevis Mark Fettes. La aliaj kvin sukcesaj kandidatoj estis Probal Dasgupta (973), Barbara Pietrzak (876), Amri Wandel (820), José Antonio Vergara (816) kaj Wu Guojiang (732). Ne elektitaj estis Petr Chrdle (653), Jukka Pietiläinen (613), Marija Belošević (529), Tomasz Chmielik (491), Paulo Branco (443), Josip Pleadin (309) kaj Johan Derks (282).

La Komitatanoj B reprezentas la individuajn membrojn. Por ĉiu komencita milo da membroj estas unu Komitatano B. Krome ĉiu landa kaj faka asocio, aliĝinta al UEA, rajtas nomumi Komitatano A, se ĝi havas pli ol 100 membrojn. Aliaj asocioj nomumas observantojn, kiuj ne havas voĉdonrajton en la komitatkunsidoj. Fine la Komitatanoj A kaj B rajtas alekti Komitatanojn C, kies nombro ne povas esti pli ol la kvarono de tiu de la Komitatanoj A kaj B.

*Gazetaraj Komunikoj de UEA*

## REU-MEMBROJ POR 2010

### INDIVIDUAJ MEMBROJ

*Arosev Grigorij (Moskvo), Grišin Maksim (Moskvo), Ĥvedĉenja Galina (Belorusio), Jakovleva Jelena (Arĥangeljsk), Komarov Dmitrij (Sankt-Peterburg), Kondraŝkina Tatjana (Moskva reg.), Konstantinov Jurij (Sankt-Peterburg), Kovaljova Valentina (Novosibirsk), Krasnokutskij Anatolij (Moskvo), Laptev Viktor (Ĉeljabinsk), Milner Aleksandr (Moskvo), Obrazcov Konstantin (Tomsk), Odincov Aleksej (Permj), Prjeobraĵenskaja Anastasija (Uljanovsk), Sokolova Evelina (Krasnojarsk), Ŝaravina Jelena (Krasnojarsk), Tonkova Eleonora (Moskvo)*

### FAMILIAJ MEMBROJ

*Karapetjan Rustam (Krasnojarsk), Obrazcova Darja (Tomsk)*

## ALIĜINTAJ KOLEKTIVOJ

**Moskva E-klubo “EK-MASI”** (+ 14 membroj): Ĉerjomin Roman, Ivancova Marina, Ĵitčenko Maksim, Kanarskij Ivan, Kudrjašova Alla, Penjkov Andrej, Penjkova Julija, Prokofjeva Julija, Rjabuhin Aleksandr, Semjonova Natalja, Sigaĉjov Aleksandr, Staĥeeva Jekaterina, Zatulov Sergej, Zatulova Marija

**Murmanska E-klubo** (+ 1 membro): Goroĥova Natalija

**Samara Esperanto-organizo** (16 membroj): Agafonova Ljudmila, Aksjonov Aleksandr, Alekseeva Olĝa, Alĝorova Jelena, Alĝakina Ljudmila, Balabancev Maksim, Fejĝin Igorj, Koĉergina Rimma, Korĥov Jevgenij, Kuznecova Jelena, Lisijenkova Valentina, Medvedeva Natalija, Prilepskaja Marija, Purigina Emilija, Sinicin Aleksej, Suslov Vjaĉeslav

**Societo “Espero” (Sankt-Peterburg)** (+ 8 membroj): Belova Lidija, Gurov Aleksandr, Izmajlova Nesipkulj, Jasirkina Darja, Jasirkina Svetlana, Kuzjmina Irina, Savina Natalja, Sokolova Nadeĝda, Wang Huai Yu

**Sankt-Peterburga klubo “Kariljono”** (6 membroj): Burkina Oksana, Ejst Svetlana, Luckaja Tamara, Ovĉinnikov Valentin, Smolenkin Nikolaj, Vorobjov Igorj

**Volgodonska E-grupo “Stipo”** (5 membroj): Afanasjeva Jelena, Afanasjeva Aljona, Fajzuln Grigorij, Kotelnikov Aleksandr, Kotelnikova Jekaterina

**Junulara Esperanto-klubo “Venko” (Volgograd)** (15 membroj): Arĥangeljskaja Svetlana, Ĉugunkina Anastasija, Ĉugunkina Olĝa, Ĥolodnova Julija, Ĵuravĥina Jelena, Kaŝirin Aleksej, Kolesnikov Anton, Kononenko Jekaterina, Koroteev Miĥail, Podporina Olĝa, Ruĥtin Aleksandr, Ŝaronov Oleg, Ŝaronova Violetta, Tikejeva Saulja, Vnukov Vjaĉeslav

Plena aktuala listo de la membroj troveblas en la ttt-ejo de REU laŭ la adreso <<http://reu.ru/index.php?dok=membrolisto>>.

## **KOTIZOJ DE REU/REJM POR 2010**

*Membri en REU oni rajtas ekde la aĝo 18 jaroj; 14-17-jaruloj rajtas aliĝi kiel kandidatoj.*

**Individua kotizo** – 180 rub. (por Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ; por ceteraj landoj – 18 eŭroj), inkluzivas la membrokarton, Jarlibron/Manlibron de REU, REU-bultenon kaj aliajn informojn de REU, voĉdonrajton en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en aranĝoj de REU/REJM.

**Dumviva kotizo** – 4500 rub. (por Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ; por ceteraj landoj – 450 eŭroj) – ĉio la sama dum la tuta vivo.

**Familia kotizo** – 60 rub. (la membrokarto, voĉdonrajto en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en aranĝoj de REU/REJM). La familiajn kotizojn rajtas pagi samadresaj parencoj de individuaj aŭ dumvivaj membroj.

**Subtenkotizoj** (ĉio la sama kiel por la individua kotizo): *REU-subtenanto* – duobla individua kotizo; *REJM-patrono* – duobla individua kotizo.

**Kolektiva membrokotizo** – 60 rub. por ĉiu aligita membro (la aliĝintaj kolektivoj

pagas minimume por 5 aligitaj membroj), inkluzivas po 1 ekzemplero de REGo kaj Jarlibro/Manlibro de REU por kluboj kun 5-15 aligitaj membroj kaj por ĉiu aldona deko de la aligitaj membroj, aliajn informojn de REU por la kolektivo; la memborkartojn, voĉdonrajtojn en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en aranĝoj de REU/REJM por la aligitaj membroj.

**Aliĝkotizo** – 300 rub., unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. La jamaj aliĝintaj kolektivoj ne pagas ĝin. La nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se la organizaĵo ne pagas kotizojn por aligitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi estas konsiderata likvidiĝinta kaj poste devus denove aliĝi.

**Rabatita abono de REGo** – 300 rub. (ekster Rusio – 18 eŭroj), por ĉiuj membroj. La dumvivaj membroj, kiuj pagis sian kotizon en 2001-2003, plu ricevados REGon sen aldona pago.

*Ĉiuj membroj de REU kun la aĝo malpli ol 31 jaroj aŭtomate iĝas membroj de la junulara sekcio REJM (Rusia Esperantista Junulara Movado) kaj ricevas voĉdonrajtojn en REJM-voĉdonoj.*

*Membroj de REU iĝas aligitaj membroj de Universala Esperanto-Asocio, la malpli ol 31-jaraj – ankaŭ de TEJO.*

Aliĝilojn, rublajn kotizojn kaj rabatitajn abonpagojn por REGo sendu (poŝtmandate) al: **Чертилову Михаилу Константиновичу, а/я 21, Одинцово-6, 143006 Московская область**; aŭ uzu aliajn pagmanierojn listigitajn ĉe <<http://reu.ru>>. La eŭraj kotizoj pagendas al la konto **reu-a-p** ĉe UEA.

---

### VENDREDE MI LUDAS GOLFON!

---

Eileen kaj ŝia edzo Bob venis al konsultiĝo post 25-jara geedzeco.

Demandite, kio estas la problemo, Eileen komencis pasian kaj dolorigan lamentadon listigante ĉiun problemon, kiun ili iam ajn havis dum la 25 jaroj.

Ŝi daŭrigis kaj daŭrigis: Neglektado, manko de intimeco, malpleneco, soleco, sento ne esti amata kaj esti neaminda, kompleta listo de neplenumitaj bezonoj, kiujn ŝi eltenis dum la daŭro de la geedzeco.

Fine, permesinte tion dum sufiĉe longa tempo, la terapiisto leviĝis, ĉirkaŭiris sian skribtabon kaj post kiam li petis al Eileen stariĝi, brakumis ŝin, malbutonumis ŝian ĉemizon kaj mamzonon, metis siajn manojn sur ŝiajn mamojn kaj zorge masaĝis ilin, kisante ŝin pasie. Ŝia edzo Bob observis tion kun levitaj brovoj!

Eileen silentis, rebutonumis sian ĉemizon kaj trankvile sidiĝis ĝuante la ardon de forta ekscitiĝo.

La terapiisto turniĝis al Bob kaj diris: “Jen tio, kion via edzino bezonas almenaŭ trifoje semajne. Ĉu vi povas fari tion?”

Bob pripensis dum momento kaj respondis: “Nu, mi povas venigi ŝin ĉi tien lunde kaj merkrede, sed vendrede mi ludas golfon.”

*(esperanto-anekdotoj)*

# Eksciu, ke...

## OKAZE DE LA JUBILEO DE SIMBIRSKA ESPERANTO-SOCIETO

La unua mencio pri la Simbirska Esperanto-Societo estis datita la 18-an (31-an) de decembro 1909. Ĝi estis listigita en la registro de societoj en la Simbirska gubernio. Jam en januaro okazis ĝia solena inaŭguro. Inter fondintoj de tiu societo estis nomo de kuracisto Vasilij Aleksandroviĉ Koposov.

Tiu nomo iĝis konata en nia regiono. Pri V.A.Koposov skribis multaj ĵurnaloj dum la jaro 2009. La 17-an de aŭgusto 2009 estis restarigita la historia justeco: sur la tombo de unika kuracisto en la historio de Simbirska-Uljanovska sanprotektio Vasilij Koposov oni starigis krucon kaj faris la funebran meson.

Vasilij Koposov estis la unua direktoro de Karamzin-kolonio por psikaj malsanuloj. Li organizis la resaniĝan sistemon en la kolonio kaj fakte fondis novan loĝlokon apud la hospitalo – nuntempe la urbeto de Karamzin.

Meritoj de V.Koposov estis rekonataj de la ŝtato

ankaŭ post la Oktobra revolucio. Malgraŭ ŝanĝo de reĝimo, li daŭre estris la hospitalon, kaj ĝiaj reguloj restis fakte la samaj ankaŭ post la caraj tempoj.

V.A.Koposov mortis la 17-an de aŭgusto 1922. Honore al li laboristoj kaj oficistoj de la hospitalo, kiuj estimis lin, starigis feran krucon sur lia tombo.

Bedaŭrinde, post la morto de V.Koposov la hospitala vivo malboniĝis. La nova ĉefo komencis rompi la antaŭan ordon, ankaŭ la preĝejo apud la hospitalo baldaŭ estis fermita.

En la 1930-aj jaroj la kruco sur la tombo de V.Koposov estis detruita, kaj tiu loko transformiĝis al senuzejo. Dum kelkaj jaroj regionografiistoj kaj unuavice eksinstruisto de urbata lernejo Miĥail Telegin kune kun siaj lernantoj provis restarigi la justecon rilate al la honora samlokano. Antaŭ kelkaj jaroj estis inaŭgurita monumento apud la nova hospitala konstruaĵo. Kaj finfine sur la tomba loko apud la duondetruita preĝejo estis restarigitaj baraĵo kaj kruco. Tio estis farita laŭ iniciato de Fervoja distrikta administracio de Uljanovsk.



La 18-an de majo 2010 ok E-klubanoj vizitis tiun urbeton. Ili trovis la tombon de Vasiliĵ Aleksandroviĉ kaj metis florojn. Poste ni fotis monumenton al V.A.Koposov antaŭ la hospitalo. Dum tiu vizito ni laŭtleĝis la biografion de la kuracisto ruse kaj Esperante. Nia esplora arkiva laboro daŭras.

*Tatjana Kuzmjina (Uljanovsk)*

## LA 22-a “AROMA JALTO”

Ĉi-jare komence de majo la E-festivalon “Aroma Jalto” partoprenis 66 samideanoj el 6 landoj: Belgio, Britio, Francio, Germanio, Rusio, Ukrainio. La plej multenombra grupo reprezentis ne Pollandon, kiel kutime en la lastaj jaroj, sed Jalton. En januaro al la elementa kurso de Jalta E-klubo venis 37 komencantoj, kaj antaŭ la festivalo plimulto el ili sukcese ekzameniĝis. Senĉesa diversflanka laboro de Jalta E-klubo komencis montri bonegajn rezultojn.

Tradicie en “Aroma Jalto” regis la lingva disciplino. Okazis dunivelaj kursoj: la porkomencanta sub gvido de Anĵela Belenko kaj la perfektiga, gvidata de Tatjana Auderskaja.

El seriozaj programeroj okazis kunsido de la klubgvidantoj, kiun partoprenis aktivuloj el Jalto, Kievo kaj Ĥarkovo, do fakte tio estis kunsido de la aktivuloj, kiuj rakontis pri la situacio en siaj kluboj kaj interŝanĝis opiniojn pri la stato de E-movado en Ukrainio. Analizante la agadon de la novelektita prezidanto dum la pasinta tempo, la partoprenantoj konkludis, ke E-movado en Ukrainio same stagnas. La sama sepdeko da membroj, kiel en la pasinta jaro fine de aprilo, la sama situacio pri “Helianto”, same mankas la agada kaj financa planoj. La prezidanto okupiĝas pri IJK, tamen en la nuna stagna tempoperiodo de evoluo de Esperanto en Ukrainio organizi IJK-on en Ukrainio en 2011 signifas nur malbonigi la situacion. Unue, la junularo ne sentas sin memstara kaj iniciatema. Due, en UkrEA la prezidanto estis elektita dume nur por unu jaro. Trie, en la nuna situacio eĉ sukcesa IJK ne plibonigus junularan E-movadon en Ukrainio, ĉar ne estos sufiĉe da tempo por aktivigi ĝin en aliaj urboj krom Kievo kaj Jalto. Tion atestas rezultoj de la pasintjara IJK en Liberec, kiu sukcese pasis, sed ne aktivigis junularan E-movadon en Ĉeĥio, kiu antaŭ la kongreso, samkiel en Ukrainio, stagnis.

Ĉu ne estas pli racie taski al ULEJ-estraro preparon de teamo por organizi IJK-on en 2012 au 2013? Ekzemplo de Jalta E-klubo montras, ke insista agado alportas fruktojn. Por ion ŝanĝi eblas organizi novjare vojaĝon al malmultekosta junulara JES kaj kune kun poloj kaj germanoj organizi poste JES-on en Ukrainio. Kiu devigas la junularon organizi la kongreson en malfavora tempo? Ĉu la prezidanto de UkrEA? Ĉu TEJO-estraro?

En “Aroma Jalto” okazis ankaŭ ULEJ-kunveno, kiun partoprenis 12 membroj de ULEJ. Estis elektita nova prezidanto Svetlana Kozarenko, sed pri okazigo de

Du judoj renkontiĝas.

– Kiel vi fartas?

– Bone. Kaj vi?

– Mi konstruigas domon.

– Bonege. Kiom da ĉambroj?

– Unu.

– Vi pravas. Malpli da ĉambroj ne havas sencon.

*juda humuraĵo de Josef Shemer*

IJK en Ukrainio en 2011 oni ne sukcesis akcepti la decidon, ĉar plimulto de la partoprenantoj sin detenis.

Ne okazis kunveno de ULEI-membroj, kiun iniciatis M.Lineckij. La 2-an de majo okazis ULEI-kunsido, kiun partoprenis 6 personoj. En la programo estis: analizo de plenumo de la agadplano, priparolo de la situacio. Nuntempe estas interesa situacio: en la Ligo membras 35 instruistoj, sed ĉi-jare instruas aŭ instruis nur 3-4 el ili! Jam delonge en Esperantujo oni konkludis, ke la ĉefa tasko de la nuntempa E-movado restas la sama, kiel antaŭ 100 jaroj, – instruado! Kaj kiu volas instrui, tiu instruas! Fine okazis kolektado de la jarkotizoj. Bedaŭrinde, ties amplekso duobliĝis kaj por la kuranta jaro egalas 4 eŭrojn. Dume rekotizis T.Auderskaja, J.Zajdman, A.Belenko, P.Mojaev kaj V.Hordijenko.

El aliaj programeroj de “Aroma Jalto” menciindas Universitato. Okazis interesaj prelegoj de la novbakita akademiano Pavel Mojaev, Wolf Krüger, Tatjana Auderskaja, Jefim Zajdman kaj Ben Indestege.

El la distraj aranĝoj mi menciu tiujn de jaltanoj: spektaklojn de E-teatro “Improviso” de Svetlana Kravcova kaj de novkreita E-teatro de miniaturoj – estas fakte imitinda nova formo de la kluba laboro! Krome okazis tradiciaj interkona vespero, KGS sub gvido de Sveta Kozarenko, koncerto de P.Mojaev, piedmarŝoj kaj ekskursoj, kiuj efektive plezurigis niajn korpojn kaj animojn!

Bonvenon al la sekva 23-a “Aroma Jalto”!

*Volodimir Hordijenko (Ukrainio)*

### **AL SEMINARIO EN HARBINO**

La 12-an de majo 2010 delegacio de Supera Popola Lernejo ĉe For-Orienta Ŝtata Teknika Universitato en Vladivostoko (pri kiu temis en REGo № 2 (57), p. 27-28) veturis al Ĉinio por partopreni la 2-an Junularan Seminarion de Esperanto en Harbino, ĉefurbo de la provinco Hejlongĝjango. Ĉiuj 8 personoj, gvide de Aleksandr Titajev, estas membroj de la Vladivostoka E-klubo “Pacifiko”.

En la programo komence okazis tre interesa ekskurso tra la urbo. La 14-an de majo okazis interkona vespero en salono de Hejlongĝjanga Scienc-teknika Instituto en Harbino. Ĉirkaŭ 50 gesamideanoj el Vladivostok kaj ĉinaj provincoj Hejlongĝjango, Jilin, Liaoning ĉeestis ĝin. Dum la interkona vespero ĉinaj gestudentoj prezentis amuzajn programerojn.

La 15-an de majo ĉiuj ĉeestantoj per aŭtobuso veturis al la Feria Vilaĝo apud Harbino, kie okazis Inaŭguro de la Seminario. Post la kantado de “La Espero” s-ro Shi Chengtai, prezidanto de Hejlongĝjanga E-Asocio, faris paroladon por bonvenigi la ĉeestantojn.

Ankaŭ salutis prof. Yin Tiechao, la prezidanto de Hejlongĝjanga Fremdlingva Instituto. Studentoj voĉlegis la salutleterojn de la Filozofia kaj Soci-sciencia Federacio de provinco Hejlongĝjango, de prof. Lee Jung-Kee, la prezidanto de KAEM, de la Azia TEJO-Komisiito kaj aliajn.

Posttagmeze ĉeestantoj parolis pri la seminaria temo “Esperanto kaj la Ĉina Tradicia Kulturo” kaj varme diskutis. Junaj samideanoj parolis pri legado de la tradicia lernolibro “Admonoj al Disĉiploj”.

A. Titajev parolis pri la eminentaj rusoj, kiuj loĝis en Harbino aŭ vizitis ĝin, ekz. pri rusa inĝeniero Kazi-Girej, laborinta en la Ĉina-Orienta Fervojo, gvidinta la unuajn E-kursojn en Harbino kaj fondinta la Manĉurian E-Societon.

S-ro Zhang Jiping, prezidanto de Jilin-a E-Asocio, prelegis pri la luktarto Taiji, liaj rakontado kaj prezentado interesis la ĉeestantojn. Interalie, la virina parto de nia delegacio dum la riposa tempo lernis la luktarton Taiji...

Post la diskutado junaj ĉinaj gesamideanoj prezentis artajn programerojn, interkantadon, dancadon.

Post vespera bankedo la ĉeestantoj refoje amasiĝis en la salono de la gastejo. Niaj rusaj samideaninoj prezentis la fabelan drameton "Kuiristo kaj Kato" de I. Krilov. Ĉinaj gejunuloj de tempo al tempo laŭte aplaudis. Gennadij Ŝlepĉenko projekciis la filmon "Fabelo pri la ora fiŝeto kaj Fiŝisto" de A. Puŝkin, kiu grande interesis gejunulojn. Ĉiuj opiniis, ke tia filmo ja estas bona lernilo por studado de E-o.

La 16-an de majo okazis la Fermo. Gestudentoj legis la Rezolucion de la seminario kaj anoncis, ke la 3-a Seminario okazos en majo venontjare en Harbino. S-ino Song Ping, kiu jam kelkajn jarojn instruas Esperanton en la Hejlongĝjanga Scienc-teknika Instituto en Harbino kaj estis ĉefa organizanto de la seminario, esprimis la adiaŭajn vortojn.



*kune kun ĉinaj gesamideanoj antaŭ la palaco de Konfuceo*

La 17-an de majo nia delegacio vizitis aliajn pitoreskajn lokojn de Harbino kaj Budaan templon. La 18-an de majo kune kun ĉinaj gestudentoj ni vizitis la palacon de Konfuceo. Tiu palaco estas unu el tri en Ĉinio. Vespere okazis akcepto en Studenta E-klaso. Dum tiu akcepto Ljubovj Karpeta rakontis pri aliaj eminentaj rusoj, kiuj loĝis en Harbino aŭ vizitis ĝin: ekz. pri Vasilij Eroŝenko, Innokentij Seriŝev, Nikolaj Reriĥ. La rakonto estis bone ilustrita. S-ino Ljudmila Abisova preparis prelegon pri la kulturo de slavoj en Fora Oriento de Rusio.

La tuta vizito pasis en vere amika etoso. La 19-an de majo ni lasis la neforgeseblan Harbinon.

**Aleksandr Titajev (Vladivostok)**



## PACMUZEAJN SALUTOJN EL SAMARKANDO!

En la 2750-jara Samarkando daŭre funkcias Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro. La ekspozicio inkluzivas jenajn sekciojn: “La Mondo kaj la Globskalaj Problemoj”, “Hiroŝimo-Nagasako: Voĉo de Memoro kaj Espero”, “Mediprotektado kaj Sana Vivmaniero”, “Belo Savos la Mondon”, “Esperanto Servas Pacon”, “Internacia Infanarta Galerio”, “La Mondo Ridetas” k.a. Vi povas legi pri la muzeo ĉe <<http://www.aliaflanko.de/urbo/samarkand/muzeo.html>>

Mi provis fari etan retan prezentaĵon de la nova pacmuzea ekspozicio ĉe la retejo. Eble vi trovos ĝin interesa. Vi povas rigardi la fotojn forme de tutekrana slajd-prezentado ĉe la adreso <<http://cmd.shutterfly.com/commands/pictures/slideshow?site=samarkandpeacemuseum&page=samarkandpeacemuseum/pictures&album=5>>.

Nuntempe estas aranĝata speciala retejo pri la muzeo: <<http://samarkandpeacemuseum.shutterfly.com>>. Estonte ĝi enhavos ankaŭ plenan esperantlingvan version.

*Anatolo Ionesov, Direktoro de la Muzeo (Uzbekio)*

## ELEKTO DE TRIONO DE LA AKADEMIANOJ

Okazis en la unuaj monatoj de ĉi tiu jaro la reelektado de triono de la akademianoj laŭ la Statuto de la Akademio de Esperanto.

Ne rekandidatis Aŝvinikumar, Gersi Alfredo Bays, André Cherpillod, Flavio Rebelo kaj Trevor Steele.

Iliajn lokojn prenis la novaj akademianoj Marcos Cramer, Lena Karpunina, Stano Marček, Paŭlo Mojajev kaj Alexander Shlafer.

Estis reelektitaj Vilmos Benczik, Probal Dasgupta, Miguel Gutierrez Aduriz, Boris Kolker, Erich-Dieter Krause, Li Shijun, Carlo Minnaja, Humphrey Tonkin, Bertilo Wennergren, Yamasaki Seikō.

Pro la ĵusa forpaso de akademiano Maŭro La Torre, nun la Akademio konsistas el 44 membroj: *Perla Ari Martinelli, Marc Bavant, Vilmos Benczik, Gerrit Berveling, Marjorie Boulton, Renato Corsetti, Marcos Cramer, Dao Anh Kha, Probal Dasgupta, Michel Duc Goninaz, Lena Karpunina, Gbeglo Koffi, Paul Gubins, Miguel Gutierrez Aduriz, Otto Haszpra, Christer Kiselman, Boris Kolker, Ilona Koutny, Katalin Kovats, Erich-Dieter Krause, Li Shijun, Jouko Lindstedt, François Lo Jacomo, Anna Löwenstein, Ma Young-tae, Carmel Mallia, Stano Marček, Geraldo Mattos Gomes dos Santos, Carlo Minnaja, Paŭlo Mojajev, Brian Moon, Barbara Pietrzak, Sergio Pokrovskij, Otto Prytz, Baldur Ragnarsson, Francisko Simonnet, Alexander Shlafer, Saka Tadasi, Humphrey Tonkin, Amri Wandel, John Wells, Bertilo Wennergren, Xie Jü-ming, Yamasaki Seikō.*

*AdE – Oficialaj Informoj*

 kultura revuo

“La Ondo de Esperanto” denove invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en la tradicia literatura konkurso “Liro-2010”. Ĉi-jare estas proponitaj du originalaj kaj tri tradukaj branĉoj:

- En la originalaj branĉoj (1, 2) oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj, en la tradukaj branĉoj (3, 4, 5) – nur per unu verko.

La originaloj de la tradukendaj tekstoj estas elŝuteblaj en la retejo de La Ondo de Esperanto: <<http://www.esperanto.org/Ondo/Liro2010.htm>>.

Sendu kvar tajptajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de “Liro” Halina Gorecka (236039, Kaliningrad, a/k 1205). La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 1-a de decembro 2010. Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso.

Oni povas sendi la tekstojn kaj slipojn rete, en apartaj mesaĝoj, al la adreso <sezonoj@yahoo.com>. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La organizanto ĝis la 1-a de januaro 2013 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la ricevitaj konkursaĵoj en “La Ondo de Esperanto” kaj elektronike. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizanto en okazo de libroforma eldono. Legu pli pri la konkurso Liro: <<http://www.esperanto.org/Ondo/Indliro.htm>>

Bonâncon!

*Halina Gorecka, sekretario de Liro*

La abunda kolekto de proverboj kaj anekdotoj el la araba kaj islama kulturo, trafe titolita *La trezoro*, kies unua eldono rapide elĉerpiĝis, estas denove havebla. Ĝia nova korektita versio ĵus aperis kun la sama grafike bela vesto kiel la unua en

2008. *La trezoro* estas rikolto de multjara kolektado de Husejn Al-Amily. *La materialo estas origine tradukita ĉefe el arabaj fontoj*, li skribas en la antaŭparolo. *Tamen, pluraj proverboj el Sumero, antikva civilizo en la nuna Irako, kaj el la malsamlanda islama kulturo, ĉefe de afgana, kurda, persa kaj turka originoj, estas aldonitaj.* Al-Amily, kiu vivas en Londono, estis aparte kompetenta por kompili la verkon. Li naskiĝis en Irako en 1927 de libana patro kaj iraka patrino kaj kvalifikiĝis universitate pri islamaj kaj arabaj studoj.

La materialon de Al-Amily redaktis Gerrit Berveling, Michael Cayley kaj Renato Corsetti taskite de la Komisiono de UEA pri Meza Oriento kaj Norda Afriko. Laŭ Corsetti temas pri *paŝo en la ĝusta direkto de Esperanto kiel ponto-lingvo inter malsamaj civilizoj je monda nivelo*, tiom pli bonvena, ĉar *pri la arabaj kaj islamaj landoj nuntempe en multaj alte evoluintaj landoj regas pli da kliŝoj ol da konoj.*

*La trezoro* estas 137-paĝa kaj kostas 15 eŭrojn. Ekde samtempa mendo de 3 aŭ pli da ekzempleroj la Libroservo de UEA donas rabaton de 1/3. Por la individuaj membroj de UEA valdias la membreca rabato de 10% jam ĉe aĉeto de unu ekzemplero. Aldoniĝas sendokostoj kaj, en EU, imposto de 6%.

***Gazetaraj Komunikoj de UEA***

### **“NEMEZA” DE A.NOBEL – EN LA RUSA KAJ ESPERANTO**

La fama sveda sciencisto kaj inventisto Alfred Nobel fine de sia vivo verkis en la sveda lingvo la kvaraktan tragedion “Nemeza”, kies eventoj okazas en Italio en la 16-a jarcento. La tragedio estis eldonita jam post morto de la aŭtoro en la kvanto 100 ekzempleroj. Tamen laŭ postuloj de liaj parencoj, indignitaj pro akra kontraŭreligia etoso de la dramo, preskaŭ ĉiuj ekzempleroj de la eldono estis neniigitaj. Kaj nur fine de la pasinta jarcento estis trovita ekzemplero de tiu libro en la Sveda Reĝa Arkivo. Pri la verko ekinteresiĝis konata sveda verkisto kaj esperantisto Gunnar Gällmo, kiu tradukis ĝin en Esperanton kaj eldonis dulingve en Stokholmo en 2003.

Laŭ peto de Internacia Informa Nobela Centro Nikolaj Krjukov tradukis la verkon de Nobel de Esperanto al la rusa. Kaj jen – ĉi-jare la tambova eldonejo “Nobelistika” eldonis belan libron kun Esperanta kaj rusa tekstoj de “Nemeza”, la eldonkvanto estas 3000 ekzempleroj.

***Nikolaj Krjukov (Moskvo)***



# *Mikaelo Bronŝtejn*

## **La urbo Goblinsk**<sup>1</sup>

**24.03.199...., merkredo**

Kiel ĉiam, ekde la oka matene Maksim estis distribuanta taskojn por la tago intersiaj skipanoj. Plejmulto jam foriris el lia kabineto, restis nur du veldistoj, kiam eksonoris telefono.

- Maksim Matvejeviĉ, – alvenis voĉo de Nadinjo. Io knaretis kaj stertoris en la aŭskultilo – ĉu la aparato mem aŭ la linio estis difektita. – Maksim Matvejeviĉ, ĉu vi aŭdas?
- Apenaŭ! – kriis Maksim. – Kion vi volas, Nadeĵda Sergejevna?!
- Mi intencas veni al vi! Post kvin minutoj! – kriis ŝi responde.
- Por kio do?!

Lazar enrigardis la kabineton, mirigita pro la krioj de Maksim. Tiu mangeste invitis lin eniri.

- Mia amikino en la regiona komisiono pri laborprotekto avertis min! – kriis Nadinjo. – Morgaŭ venos grupo de komisionanoj, eble, tri... eble, eĉ kvar personoj! Por kontroli laborkondiĉojn en la uzino! Mi volas preni vin kun Lazar Aronoviĉ kaj kune viziti ĉiujn metiejojn!
- Bone! – kriis Maksim. – Lazar Aronoviĉ jam estas ĉi tie! Venu!

Lazar citis malnovan ŝercon:

- “Ruso krias en la aŭskultilon. Al kiu vi krias? – demandas najbaro-japano. – Al Moskvo. – Sed ĉu vi ne povus paroli per telefono?..”

La veldistoj ekgakis. Maksim mienigis rideton kaj diris al ili:

- Jen do, buboj. Morgaŭ venos kontrolistoj, do ordigu viajn laborlokojn: instalu ŝirmoŝildojn por ne blindigi la homojn, kaj por ke sparkoj ne flugu ĉien ajn. Kontrolu gasbalonojn, tubojn, kablojn, fajroestingilojn... vi ja bone scias, kion endas fari por ke ne estu riproĉoj.
- Krudtolajn gantojn novajn donu, ĉefo! – grumblis unu el la veldistoj.
- Sed kie estas la viaj, ricevitaj komencmonate?
- Truitaj ili estas! – laŭte elparolis la dua. – Vi mem scias, ke ne sufiĉas unu paro por la tuta monato.
- Dependas... – rebatis Maksim, komprenante, ke la veldistoj nur faras uzon el onta vizito de la kontrolistoj. – Tamen bone, ricevu.

Li prenis el ŝranko du gantoparojn kaj donis al la veldistoj. Tiuj foriris. Lazar staris ĉe la tablo, iel strange rigardante al Maksim de supre malsupren. Nigra ŝaŭmo de risortecaj krispaj bukloj hirtis laŭronde elsub lia kasketo.

- Sidigu, Lazar, – diris Maksim, – kaj ne okulumu min samkiel Lenin la burĝaron. Tuj alvenos Nadinjo – vi komprenis... Ni iros por antaŭkontroli... sed jam nun

---

<sup>1</sup> Ĉapitroj el la nova romano. Antaŭaj ĉapitroj el tiu ĉi verko estis publikigitaj en REGo №№ 3 (40), 3 (46), 5 (48), 2 (51), 5 (54), 2 (57). (La red.)

mi volas peti cin: sendu ciajn bubojn por ŝanĝi ĉi tie lampojn nelumantajn – almenaŭ kelkajn. Faru iom pli da lumo, ja certe, tiuj kontrolistoj alvenos kun luksmezurilo. Nu, kial ci okulumas?

- Ci estas frato por mi, Maksimĉjo... – diris Lazar, plu borante lin per siaj brunbrilaj okuloj. – Antaŭnelonge iu prizorgis suban parton de cia vizaĝo, pli-malpli fakule prizorgis... Sed mi prizorgos pli senteble. Se ci ofendos Evan.
  - Nun mi diru, – respondis Maksim serioziĝinte. – Ci ĉion scias pri mi, mi ĉion scias pri ci. Mankas sekretoj ĉi tie. Cia edzinjo neniam scias pri ciaj aventuroj, sed eĉ se ŝi ion scias, do – ne de mi...
  - Ha! – Lazar metis siajn manegojn sur la tablon kaj proksimigis la vizaĝon al Maksim. – Mi diru al ci tiel, fraĉjo. Unue, dankon por cia digna konduto. Due, miaj aventuroj – ci bone scias tion – estas nur aventuroj momentaj. Nu, ŝatas min la ina aro, ĉu mi ofendu iun el ili per rifuzo?.. Trie, Eva estas mia plijuna fratino, kaj mi devas zorgi pri ŝia bonfarto. Kvare, ci, kun cia trohonesteco kapblas nek agi kun ciaj inoj tiel, kiel mi agas kun la miaj, nek bone kaŝi ciajn heroaĵojn. Kvine...
  - Ĉesu, Lazar! – diris Maksim abrupte. – Ci scias, ke mi neniam ofendos Evan... ne faros malbonon por mia familio. Sed kiu sciu pli bone ol ci, ke Eva estas virino iom speciala? Sekve, ĉu estu ci, kiu malaprobu, se mi trovus iom da varmo, kiun mi bezonas?
  - Ci pravas kaj ne pravas, fraĉjo, – Lazar metis la dekstran manon sur ŝultron de Maksim kaj skuetis pacige. – Do faru laŭ cia bontrovo, sed memoru, kion mi promesis al ci.
  - Mi memorfiksos, – respondis Maksim. – Sed nun diru, kiom da akcioj ci planas akiri?
  - Kial ci demandas? – miris Lazar. – Ci ja aŭdis hieraŭ, mi diris – dek...
  - Mi aŭdis, – diris Maksim, – sed kion ci intencas skribi en la fermotan koverton? Lazar montris eĉ pli gravan ekmiron kaj volis diri ion ravitan, sed tiumomente la pordo ovriĝis.
  - Do, Lazar Aronoviĉ, – laŭte diris Maksim, kvazaŭ ne rimarkinte Nadinjon, – mi supozas, ke viaj elektristoj jam anstataŭigas malbonajn lampojn per la novaj, ĉu ne? Saluton, Nadeĵda Sergejevna!
  - Memkompreneble! – konfirmis Lazar, turnante sian kapegon al Nadinjo. – Bonan matenon, kamarado protektantino!
  - Bonan matenon, kamarado ĉefelektristo! – reeĥis Nadinjo kun rideto. – Bonan matenon, Maksim Matvejeviĉ. Mi aŭdis, ke vi estis parolantaj pri la lampoj, do...
  - Nadi-injo! – flustrokrietis Lazar, farante grandajn okulojn. – Ne perdu vian tempon, ne parolu pri tio. Ĉio estas decidita, bonŝance, la lampojn mi havas en sufiĉa kvanto... la kontrolistoj ricevos tion, kion postulas la regularo.
- Li leviĝis de sur la seĝo, metis la manegojn sur la ŝultrojn de Nadinjo kaj, klininte sin al ŝi, tuŝis ŝian ruĝiĝintan vangon per la sia.
- Lazar Aronoviĉ... – elspiris Nadinjo. – Kion vi faras?! En la oficejo! Mi skribos raporton por ke la direktoro vin monpunu pro... pro tio ke vi pikis min per via

vango...

- Ha! – respondis Lazar gaje. – Mi pretas esti punita. Tamen pardonu, Nadinjo, mi ne havis tempon matene por razi min.
- Mi estas razita, – diris Maksim, tuŝante la alian ruĝan vangon de Nadinjo. – Tamen ni iru – se ni ne longe diskutos en ĉiu loko, ni sukcesos esplori ĉion antaŭ la tagmanĝo.

Triope ili trapaŝis la bruajn metiejojn, – ekde la mekanika, tra du muldaj, celuloidea kaj paka, – vizitis stokejon de krudplasto kaj tiun de produktitaj varoj, kaldronejon, transformatorejon, la maŝinsegilejon de Kolja... Ili parolis kun laboristoj, ĉe tio Nadinjo registris kelkajn plendojn en sian dikan notlibregon. Maksim riproĉis la muldestron Anton Daniloviĉ pro plendoj de kelkaj muldistinoj – lignaj postamentoj ĉe kelkaj muldmaŝinoj estis rompita. Tra la muĝadon kaj sibladon de la maŝinaro Anton Daniloviĉ provis pravigi sin, kriante, ke estas Kolja, kiu kulpas, ĉar li, Anton Daniloviĉ, jam antaŭ kelkaj semajnoj estis mendinta novajn postamentojn... Kelkfoje Nadinjo postulis, ke Lazar malfermu elektroŝrankojn – kompreneble, tie multloke anstataŭ protektiloj estis ŝovitaj dratpecoj. Nadinjo montris ĉiun dratpecon per fingreto kaj per la sama fingreto minace gestis al Lazar, kiu pene konservis seriozan mienon, dirante “Tuj-tuj!” aŭ “Senprokraste!” Meze de la itinero ili sukcesis teumi en eta ĉelo de Lidia Petrovna, kie eĉ la teo havis iom da ĉienpenetra acetonaodoro. Tiamaniere, post trihora pli-malpli gaja promenado, ili atingis la manĝejon ĝuste al la tagmanĝa paŭzo.

La manĝejo estis rekonstruita antaŭ ses jaroj per preskaŭ lastaj dotoj de la socialisma sistemo. La leĝerindustria ministerio, al kiu apartenis “Rusoplast”, donadis la monon pli-malpli senavare. La plej informitaj uzinanoj – ĉirkaŭ kvin – sciis, ke parte tiu mono per dokumentoj, mildadire, ne tro leĝkonformaj, foriris por riparado de tegmento en la eksterurba domo de la unua sekretario de la Gorkomo. Tamen tiun ĉi kvinopon, des pli la ceterajn uzinanojn, tiu fakto absolute ne zorgigis. Unue, ĉar helpo de urbaj enterprenoj al la gorkomanoj estis afero memkomprenebla kaj ordinara. Due, ĉar la riparado de uzina manĝejo neniom suferis pro parta monperdo. Ĉio estis farita altnivele! Projekton por la rekonstruo faris la plej klera kaj talenta urba dezajnisto Maljukov. La bezonatajn materialojn, neaĉeteblajn en vendejoj pro totala manko de ĉio ajn, la direktoro akiris en Peterburgo (tiam ankoraŭ Leningrado) dank’ al personaj kontaktoj de la helpita Gorkom-sekretario. Interalie dezajnisto Maljukov ricevis dek du grandajn kuprajn foliojn kaj mem cizelis fabelajn figurojn de Zodiak-signoj, kiuj nun ornamis la ore-brunajn murojn de la manĝsalono. Sep tre imponaj lustroj, kiujn Eŭgeĉjo alportis el Erevano, kreis en la salono komfortan etoson de mezklasa restoracio. Ne temis, certe, pri kvalito de manĝaĵoj, sed Larisa, la manĝejestrino, kun du helpkuiristinoj mirakle kreadis el magraj provizaĵoj manĝeblajn kaj eĉ bongustajn pladojn.

- Aŭdu, Ŝumskij! – vokis la direktoro, manĝanta ĉetable kun Nina Dmitrijevna kaj Anna Antonovna sub nuda kupra sveltulino – la Virgulino-signo. – Kie vi vagadis? Ekde la mateno mi serĉas vin!
- Viktor Vasiljeviĉ! – Nadinjo intervenis defende. – Laŭ via persona ordono mi kun Maksim Matvejeviĉ kaj Lazar Aronoviĉ inspekciis la tutan teritorion...

Morgaŭ venos la kontrolistoj – mi raportis al vi!

- Jes, mi rememoras... – murmuris Sigaev. – Mi esperas, ke post via promeno la morgaŭaj kontrolistoj ne trovos gravan malbonon. Sed vi, Ŝumskij, tamen venu al mia kabineto tuj post kiam vi finmanĝos. Ni havas gravan aferon...
- “Ni havas gravan aferon...” – moke imitis Maksim nelaŭte, sidiĝante kun Lazar kaj Nadinjo ĉe libera tablo. – “La tubo fumas ne tiun direkton!” Ŝanĝiĝas nia Viĉjo, ĉu ne, Lazar? Abrupte iĝas alia homo...
- Eĥ, se nur li... – suspiris Lazar. – Mi ne miros, Maksiĉjo, se ĉi-jare ni nomos multajn amikojn eksaj.

Nadinjo ial ruĝiĝis – tio estis videbla eĉ en la duonkrepusko de la salono. Ŝi prenis kuleron kaj enpenŝinte rigardis la teleron kun vaporanta brasiksupo. Tra la fluanta vaporo videblis ŝiaj larĝiĝintaj okuloj. Ŝiaj pensoj kaj sentoj ĉiam montriĝis senkaŝe sur ŝia knabineca vizaĝo, sed la okuloj... Maksim sciis, ke tio okazas ĉiufoje, kiam Nadinjo volas diri ion gravan, sed hezitas.

- Do, Nadinjo? – li diris, glatante siajn harojn post depreno de la kasketo. – Malpezigu la animon...
- Mi aŭdis, Maksim Matvejeviĉ... – ŝi ekflustris arde, – mi aŭdis, ĉar la muro inter niaj kabinetoj... inter mi kaj Nina Dmitrijevna estas maldika... estas stukita liganajo... Mi aŭdis!..
- Ĉu mi foriru? – Lazar finmaĉis viandopecon.
- Kial do vi, Lazar Aronoviĉ? – ofendite elflustris Nadinjo. – Simple mi... mi ne scias. Mi aŭdis, ke matene li kriegis en la najbara kabineto... per obscenaj vortoj pri vi, pri Kirzov, sed eĉ pli – pri Maksim Matvejeviĉ kaj pri Kuzmiĉov... Per tiaj vortoj!
- Nu, se pri Kuzmiĉov, mi komprenas la kaŭzon, – diris Maksim.
- Kion ci komprenas? – demandis Lazar scivoleme.
- Ne gravas... eble, mi eraras. Do mi diru poste.

En la malplena akceptejo Maksim karese tuŝis per polmo vangon de Irinjo kaj sen hezito malfermis la blankan pordon kun ŝildeto: “Direktoro Sigaev V.V. Akceptas pri personaj demandoj ĵaŭde, je la 14.00 – 16.00”.

Viĉjo sidis sur sia brakseĝo, foliumante malpuretan enketajon de Maŝa kaj Kira. Dekstramane de li, en la ĉefinĝeniera loko, sidis Nina Dmitrijevna, ion sufloranta nelaŭte. La direktoro tenis en la mano ruĝan krajonon, kaj foj-de-foje metadis sur la foliojn streketojn, demandsignojn aŭ iujn vortojn.

- Eniru, Ŝumskij, – li mangeste montris al Maksim la seĝon de maldekstre. – Sidiĝu ĉi tie, pli proksime.

Maksim aliris kaj okupis la seĝon. Dum lia iro Nina Dmitrijevna haste renversis kelkajn paperfoliojn, kuŝantajn antaŭ ŝi, kaj ĵetis al Maksim embarasite kulpan rigardon. Sigaev dum iom da tempo montris mergiĝon en la enketliston, murmuradis ion nekularan kaj movetis la lipharojn.

- Do, – diris li fine, levante la okulojn al la etatestrino, poste movante ilin al Maksim. – La afero iras en bezonata direkto, ĉu ne? Nur kelkaj demandoj restas...
- Nina Dmitrijevna rapide kapjesis kelkafoje.
- Maksiĉjo, – la direktoro uzis la ĉiaman poramikan nomon de Maksim, – ĉu ci

memoras la naŭan de majo en la sepdek kvina jaro? La vesperon?

Certe, Maksim memoris tiun vesperon. Estis la trideka datreveno de la Venko. Kun siaj tiamaj amatinaj ili estis en Leningrado. Ili trinkis bieron en iu kelo, postmanĝante sekigitajn fiŝetojn, poste venis al la bordo de Neva por spekti festan fajrospektaklon. La kajo estis plenŝtopita de homamaso, tamen ili sukcesis okupi bonan placeton ĉe balustrado kontraŭ la Kunstkamero<sup>1</sup>, kaj bonege vidis la krozadon de militŝipoj, la ĉielon kaj la akvon, lumigitajn per diverskoloraj fajretoj, la torĉojn super la du kolonoj en Vasiljevskij-insulo... Maksim respondis nenion, sed la respondo estis en lia rigardo.

— Ĉu ci memoras, ke ni savis nin nur ĉar ni restis kune? — plu demandis Sigaev.

Ankaŭ tion Maksim memoris. La furiozan, blekantan amasegon, moviĝantan for de Neva post la fino de la spektaklo. Dense, dense, unu ĉe la alia. Kelkaj falis kaj estis grave vunditaj, torditaj kaj tretitaj de la amaso; kompreneble, tiamaj ĵurnaloj ne rajtis raporti, sed oni rakontis pri kelkdeko da viktimoj... Maksim kun Viĉjo ne falis. Ordoninte al la knabinoj sekvi ilin tuŝproksime, ili man-en-mane defendis areeton ĉirkaŭ si kaj, post duonhora baraktado, senperde atingis liberan spacon... Maksim silentis.

— Do mi supozu vian komprenon, ke ankaŭ nun ni devas resti kune por venki, — resumis Viĉjo.

La tutan tempon li ne formovis la rigardon de Maksim, kvazaŭ esplorante reagon de la vizaĝmuskoloj, de la okuloj, de la lipoj, eble montrantaj rideton. Ankaŭ Nina Dmitrijevna, demetinte la okulvitrojn gapis al Maksim per siaj kulpaj okuloj. Maksim silentis.

— Ŝumskij! — la direktoro ŝanĝis la voĉtonon. — Kiom da akcioj vi volas akiri?

— Mi rajtas ne diri, Viĉjo, — respondis Maksim, — sed al ci mi diru. Ducent. Ĝuste tion mi diris ankaŭ al la knabinoj.

— Stranga ulo... — diris Sigaev al Nina Dmitrijevna. — Jen vidu, mulda metiejo — maksimuma deziro estas dek akcioj. Celuloida metiejo — kelkaj tute ne volas akciojn... aliaj jen — tri... kvin... La homoj de Kolja — du... kvin... ok... Vidu lin — li volas ducent!

— Antaŭnelonge ni proponis al vi unu bonan solvon, Viĉjo, — diris Maksim. — Eble, ĉiuj ni estis ebriaj tiam, sed vi tuj rezignis... Sed nun... tutegale vi devas ion oferi al la kolektivo. Ĉirkaŭ ducent kvindek uzinanoj, ĉu ne, Nina Dmitrijevna? Eble, ne ĉiu el ili, sed la plimulto anoncos ian kvanton en la kovertoj. Tridek procentojn vi, eble, ricevos...

— Ne saĝumu... — grumblis Viĉjo sen troa certeco kaj rigardis fenestren.

— Maksim Matvejeviĉ, — milde elparolis la etatestrino, — sed vi... pro kio vi ekdeziris akiri ducent akciojn?

— Ĉar mi studis iomete la privatigan leĝon, — respondis Maksim. — Mi ne intencas rompi la planojn de Viktor Vasiljeviĉ, sed... ducent akcioj estas du procentoj de la tuto. Persono aŭ grupo, posedanta du procentojn, rajtas iniciati ekstervican kunvenon de akciuloj ĉe bezono. Mi ne volas serĉi iun, agiti grupon — ĉe be-

---

<sup>1</sup> Kunstkamero — antropologia kaj etnografia muzeo, fondita de Petro la Granda.



zono. Mi volas mem havi tiun ĉi etan rajton.

- Esperantisto... – kun malkaŝa minaco diris Viĉjo. – Sciulo... Kiu multe scias, malbone dormas...

Maksim ekridetis. Strange, sed tiu minaca diraĵo absolute trankviligis lin.

- Jes, – li diris. – Foje mi vekiga nokte... Strangaj sonĝoj venas – iam mi rakontos al vi...

- Sen bezono, – reagis Sigaev. – Min ne interesas viaj sonĝoj... via persona vivo... sed, verŝajne, oni ne sufiĉe vin edukis antaŭ iom da tempo.

- Ĉu estas vi, kiu aranĝis? – trankvile demandis Maksim. – Dankon, mi konsideru tion.

- Tro da honoro por via persono, – neglekte elparolis Sigaev, – se mi aranĝus... Mi nur vidis vian makzelon... Sidu hejme, ne vagadu dum noktoj, kaj eduko ne okazos. Cetere... ĉu vi povas klarigi al mi... kaj al nia estimata Nina Dmitrijevna, prezidanta la privatigan komisionon, kial via Kuzmiĉov pretendas pri kvarcent akcioj? Ĉu ankaŭ li estas esperantisto? Aŭ estas vi, kiu agitis?..

- Viaj knabinoj agitis, – respondis Maksim. – Demandu Kolja-n, li ĉeestis. Nina Dmitrijevna ne povas antaŭvidi ĉiujn tiklajn demandojn, kiujn inventos saĝa laboristo. La knabinoj ne ricevis precizajn instrukciojn, do per nekonvenaj respondoj ili agitis.

- Kiaj demandoj? Kiaj respondoj?! – Nina Dmitrijevna paliĝis, atendante ekfurioziĝon de la direktoro, sed tiu restis indiferenta.

- Kompreneblas, – li diris abrupte. – Ŝumskij, e-e...diru al Kuzmiĉov, ke mi invitas lin en mian kabineton en la fino de la labortago. Danku dion, ke li estas sola inter la viaj, kiu saĝumas samkiel vi...

- Viktor Vasiljeviĉ, – Maksim skrapetis la nukon, eldirante nekutiman por li oficialan nomon. – Ĉu ne venis al vi penso, ke iu el la etatanoj de “Rusoplast” povas blufi?

- Kiel blufi? Por kio? – Sigaev streĉiĝis.

- Do, ekzemple, skribi en sia koverto ne la samon, kio estas skribita en tiu ĉi listo...

- Kiu?! Ĉu vi supozas, ke iu kapablas? Kiu?! Ĉu vi?! – ŝvito aperis sur la frunto de la direktoro.

Maksim ne atendis tian reagon, sed respondis sen videbla embarasiĝo:

- Mi ripetos en mia koverto tion, kion mi jam diris kaj skribis. Kaj mi absolute ne scias, al kiu povas veni la ideo pri blufi. Mi nur diris mian opinion, ĉar... ĉar eĉ ne estas blufi – nur antaŭvidemo. Ja tiu ĉi enketado – vi kaj mi, des pli Nina Dmitrijevna – komprenas, ke ĝi estas kontraŭleĝa...

- Nu-nu... – murmuris Sigaev. – Tamen ni ĉesu diskuti pri tio. Mi havas por vi, Maksim Matvejeviĉ, pli interesan kaj pli gravan aferon. Ja vi multfoje petis pri terpeco eksterurba por ĝardenumado, ĉu ne, Nina Dmitrijevna?

- Je-es! – kun ĝojo kaj preteco eksklamaciis Nina Dmitrijevna. – Ĉe mi kuŝas lia petskribo. Jam delonge.

La direktoro eligis tirkeston de sia tablo kaj prenis de tie dikan dosierujon. Konspire rigardante al Maksim, li diris:

- Jen! La regiona estraro finfine konfirmis ĉiujn dokumentojn. Post trijara traktado ili donis al “Rusoplast” parcelon! Ses hektarojn... do por sesdek dezirantoj sufiĉos. Kiom da petskriboj vi havas, Nina Dmitrijevna?
  - Kvardek ok, – ŝi tuj respondis.
  - Jen do, – Sigaev turnis la kapon al Maksim. – Ni rajtas distribui po mil kvadrataj metroj por persono, pli ĝuste – por familio. Kelkajn pecojn ni devos oferti al bonaj homoj – la urbodomaĵoj petas tri pecojn... la rekrutestro... la banko... estas bezonataj homoj, vi komprenas. Sed restos tereno, sufiĉa por kontentigi ĉiujn niajn dezirantojn. Do mi proponas al vi, Maksim Matvejeviĉ, preni la aferon en viajn manojn.
- Ĉu ĝoji, aŭ ne – Maksim ne sciis. Certe, li ekde longe volis havi propran terpecon – planti tie pomarbojn, munti forcejon, prizorgi iujn kreskaĵojn, ekzotikajn por la regiono, ekzemple melongenojn... Ankaŭ Eva plendadis, ke legomoj iĝas pli kaj pli altprezaj, do endus kultivi la proprajn... Tamen en la nuna situacio tiu ĉi ago de Viĉjo odoretis, verdire, kiel subaĉeto...
- Sed Viĉjo jam malfaldis sur la longa kunsidtablo paperegon kun plano de la tereno.
- Ne pensu longe, Maksim! – krietis li kuraĝige. – Mi scias, pri kio ĉi pensas. Sed kiam ĉi iomete mergiĝos en la aferon, ĉi komprenos, ke ĝi estas ne grava donaco, sed granda laboro: dokumentoj, instancoj... vojon endas konstrui, almenaŭ provizoran. Tamen rigardu ĉi tien: pli ol duono de la tero situas tuj ĉe la riverbordo. Akvon vi havos sen problemoj. Por vi mem elektu la plej bonan peccon. Ankaŭ por Kirzov – mi vidis lian petskribon. Ha, cetere, ankaŭ via Kuzmiĉov petis! Li elektu la unua post vi. Do?
  - Ne hezitu, Maksim Matvejeviĉ, – diris la etatestrino. – Estas la lasta ŝanco! Kiu scias, ĉu la superaj estroj poste donos la teron senpage? Sed konsideru, ke ankaŭ mia petskribo ekzistas...
  - Mi konsentas, – kurte diris Maksim.

## SAMA KREDO

Patro al filo: “Edziĝu nur al juda virino, kiu havas la saman kredon kiel nia familio.”

Filo: “Paĉjo, kial mi prenu edzinon, kiu kredas ke mi estas idioto?!”

*juda humuraĵo de Josef Shemer*

## KLARVIDA SOLVO

Kruko estas ĉe d-ro Klarvid, la okulisto.

D-ro Klarvid: Ĉu vi povas legi la lastan linion, Kruko?

Kruko penas: He... “E”? Aŭ eble “2”...?

D-ro Klarvid: Eĉ ne proksime! Kruko, vi bezonas okulvitrojn!

Kruko: Ne, ne, doktor’. Mi nur bezonas pli grandan liter-afiŝon.

*(esperanto-anekdotoj)*

## Poemoj de Aleksandr Logvin

*Aleksandr Logvin-Liljer (1903-1980) estas unu el niaj plej famaj poetoj-esperantistoj. En 1964 aperis lia poezia kolekto "Sur la vivovojo", sed ankaŭ post tio li fruktodone verkis kaj tradukis el la rusa kaj ukraina lingvoj. En 2003, okaze de la 100-jara jubileo de la poeto, estis publikigitaj en aparta broŝuro kelkaj arkivaj materialoj de Logvin sub la titolo "La lasta taglibro de l' poeto", tamen tio ne elĉerpas la tutan lian malbone konatan poezian heredaĵon. Multaj liaj poemoj, ĉefe porokazaj, sed ankaŭ sufiĉe memstaraj, troviĝas en liaj leteroj al diversaj korespondamikoj. Plejparte tiaj leteroj perdiĝas, sed, feliĉe, ne ĉiam.*

*Antaŭ sia morto lia multjara franca korespondamiko Jean Lezan ordigis siajn paperojn kaj transdonis tion, kion li decidis konservi, al Perigorda Esperanto-grupo. Tie estis leteroj de Logvin dum lasta jardeko de lia vivo, inter 1971 kaj 1980, kun multaj poemoj, ĉefe neniam eldonitaj (parto dediĉita al Jean Lezan). La perigordaj esperantistoj multobligis la leterojn en du volumoj (la duan volumon konsistigis fotokopioj de multegaj bildkartoj), kaj disponigis unu ekzempleron por ni. Do, mi prezentas kelkajn plej interesajn poemojn por legantoj de REGo (aliajn poemojn el leteroj al J. Lezan oni povos legi en la revuo "Scienco kaj Kulturo").*

*Nikolao Gudskov (Moskvo)*

### *Al Jean Lezan okaze de lia 75-jara jubileo (31.01.1977)*

Spirit' revolucia  
Brubolas en la brusto.  
Deviz' de l' vivo via –  
Liber', kuraĝo, justo!

Senŝanceblebla franco,  
Estinta rezistanto,  
Kaj kun satira lanco –  
Porpaca batalanto.

Vivmaniero – sparta.  
Esperantisto – sperta.  
Naturamiko – arda.  
Abelbredisto – lerta.

Kaj vi en ajna sfero  
Ekzemplodone rolas,  
Ĉar vivi sur la Tero  
Alie ne valoras.

### ***Abelo***

*Al Jean Lezan, mia franca amiko, abelbredisto*

Kion vi zumas,  
abeleto?  
Ha, kompreneblas  
via tristo:  
Ja falĉi volas  
ĝis la treto  
La trifoliojn  
ĉi falĉisto.  
Vi petas:  
– Lasu kvankam solan  
Floreton dolĉan por abelo,  
Kompatu min,  
la senkonsolan,  
Ne lasu do min  
sen mielo...

### ***Al Nikolaj Danovskij okaze de lia 70-jariĝo***

Ne multaj restis veteranoj  
Sub verda stel' de l' mondlingvanoj...  
Kaj inter ili – vi, fervora,  
Fidela, firma kaj bonkora!  
Duono de l' jarcent' – konatoj,  
Ni iras vigle tra sortbatoj...  
Ni konatiĝis dum kongreso:  
El Moskvo mi, vi – el Odeso.  
Ho, Leningrad'! Ho rememoro  
Pri urbo de l' Oktobra gloro!  
Invitis gastojn vi anime  
El tuta mond', de malproksime...  
Levinte la nebul-kurtenon  
Mi vidas sesan SAT-festenon...  
Ni estis junaj, spritaj, bravaj!  
Kaj kio restis? Fotoj flavaj...  
Sed lasu cindron de l' paseo –  
La vivo vokas nin al kreo!  
La paco – ĝoj' de l' Harmonio –  
Por la Muziko, Poezio,  
Por la homar' kaj rozpetalo,  
Por l' Universo kaj kristalo,

Por venko de konkurs-amikoj  
Sub hela flag' de l' Olimpikoj!  
La harmonia kolektivo  
Disfloras nur en paca vivo.  
Ni vivas. Kaj en tio – ĝojo.  
Pluiru ni laŭ paca vojo!

*Decembro 1975*

### ***Laura***

Subita rememor' el juno:  
Krimeo. Astroilumino.  
Rebriloj sur la mar' de luno.  
Kaj mi. Kaj mia ĉarmulino.

Ĉi tiu iluzi' lazura  
Eklumis antaŭ mi el krono  
De brilaj versoj pri Laura.  
Senmortaj versoj pri Madono.

Petrarca. La sonet-volumo.  
Mi foliumas l' eternecon.  
Min ĉarmas poezia lumo  
De olda glor' kaj libereco.

Post sesjarcent' al mia koro  
El for' antikva, for' lontana  
Alvenis viva belsonoro –  
Itala vorto. Italiana.

L' anim' kantanta de l' poeto  
Invitas nin al stat' nirvana.  
Agrabla por moment' kvieto  
En akompan' de l' hom' humana.

Renkonto kun la eterneco,  
Kaŝinta sin en la volumo,  
Inspiras min. Kaj en soleco  
Mi, olda, armis min per plumo.

Flugilojn levas la spirito  
Super la mond' tumultoplena,  
Super minacoj de milito,  
Super la nuno fenomeno.

Ve al krimea ĉarmulino!  
Silentas marnebulu blua...  
Lamento – vana pri destino  
Kaj la bedaŭro – superflua.

Laura, hela ĝoj' Laura,  
De nun – mi via adoranto.  
Kaj mia am' platone pura –  
Ĉe via belo radiantanta.

Fuĝinta for el sorĉa rondo,  
El brulo de la glor-resono  
Petrarca iras tra la mondo  
En akompano de l' Madono.

\*\*\*

Venis tempo por vekigo  
De la Jino, de la Novo,  
Verda-blua senrevigo  
De l' etern' al ĉiopovo.

Iru vi kun ni, amikoj,  
Ĉesu sidi en fotelo.  
Kun abeloj, kun formikoj  
Nin invitas maja belo!

Ĝoju ni al najtingalo,  
Kantu mem, ĝis pulsas koro!  
La konvala festivalo  
Sorĉas dum nelonga horo...

*01.05.1973, Lubni, Ukrainio  
(Poŝtkarto adresita al Jean Lezan)*

- 
- Sara, kiom vi pezas?
  - Kun okulvitroj – cent dudek kilogramojn.
  - Kaj sen okulvitroj?
  - Sen okulvitroj mi ne vidas la ciferojn.

*juda humuraĵo de Josef Shemer*

## ***Gudrun Pausewang***

### **LUDI MILITON**

*Kiel jam plurjara abonanto ĉiam mi legas kun granda intereso la gazeton REGo. Kaj leginte en la numero 1 (56) la artikolon de Anna Striganova (pp. 24-26), mi decidis, ke nepre devas respondi al ĝi, t.e. sendi tekston el tradukita de mi nova libro. Temas pri unu el la rakontoj de la libro "Pacrakontoj" de Gudrun Pausewang. Ŝajnas al mi, ke tiu rakonto plene reagas al la supre menciita artikolo.*

***Nora Caragea (Germanio)***

Onklo Bernardo denove faris viziton al la familio. Filipino tre ŝatis lin. Onklo Bernardo estis dek kvin jarojn pli aĝa ol la patro de Filipino kaj havis jam grizan hararon. Kun li neniam estis enue, kvankam li havis nur unu brakon. La alian li perdis dum la pasinta milito.

Dimanĉon antaŭtagmeze ili foriris por kune fiŝkapti. Sed fulmotondro kun tre forta pluvo forpelis ilin hejmen. Posttagmeze, kiam la tuta familio sidis antaŭ la televidilo, okulumis onklo Bernardo kun Filipino kaj ili foriris, nerimarkitaj de la aliaj.

"Belegas aero ĉi tie", onklo Bernardo diris, kiam tuj malantaŭ la ĉevalpaŝtejo ili ekiris la vojon en la arbaron. "Kaj kion ni faru nun?"

"Ludi militon", Filipino respondis fulmrapiĉe.

Onklo Bernardo ne respondis. Sed kiam Filipino rigardis lin plena de espero, li demandis penseme: "Ludi militon? Ĉu tio povas esti tiel bela?"

"Belega", Filipino diris. "Kaj tute ne enuiga."

"Ne, tute ne", reagis onklo Bernardo. "Milito vere ne estas enuiga."

"Oni povas mortpafi aliajn kaj per tanko superveturi ĉion, ĵeti grenadojn kaj superruzi la malamikon kaj malliberigi lin, malsuprensalti per paraŝuto kaj entute vere batali", Filipino reagis entuziasmigita.

Li miris, ke onklo Bernardo denove ne respondis.

"Dum milito oni povas pruvi sian kuraĝon", Filipino daŭrigis klarigi. "Oni povas iĝi heroo. Kaj oni povas fari tiom multe, kiom oni ne rajtas fari kutime. Kaj antaŭ ĉio oni povas venki. Venki donas plezuron – aŭ ĉu vi ne opinias tion?"

"Al milito apartenas minimume du," onklo Bernardo diris. "Unu, kiu venkas, kaj la alia malvenkas."

"Oni do ne devas esti tiom stulta por malvenki", Filipino diris fervore.

"Ŝajnas al mi, ke vi tre bone konas la militon", la onklo respondis.

"Kompreneble," Filipino diris, "ĉiam mi rigardas la militajn filmojn."

"Aha," la onklo diris.

"Kaj kiam komenciĝas la milito, plej ofte la homoj ekĝojas kaj iĝas tute senpaciencaj", Filipino diris.

"Tio estas ja vera", onklo Bernardo diris malserene. "Ankaŭ mi antaŭĝojis – ĉar mi ne konis la militon. Mi imagis ĝin tia kia en la filmoj: la bonuloj venkas, la

malbonuloj malvenkas, la senkulpuloj estas savitaj kaj la kulpuloj estas punataj. Ĉu ne?”

“Plej ofte”, Filipino respondis malcerte.

“Do, bone”, onklo Bernardo diris, “ni do ludu militon. Sed mi konas la militon. Pro tio mi nur ludas la tute veran militon, ne tiuspecajn *Western*-bataletojn.”

“Ho jes”, Filipino reagis entuziasmigita, “ni do ludu tute veran militon!”

“Mi timas, ke vi tute ne imagas, kion vi spertos”, la onklo diris. “Vi komencos plori.”

“Ĉu mi?” Filipino diris ridetante. “Je tio vi povas atendi tre longe.”

“Filipo,” la onklo diris preskaŭ solene, “mi ne volas persvadi vin al tiu ludo. Se vi komencas ektimi kaj eble vi volas ludi ion alian, mi ne nomos vin malkuraĝa. Sed mi avertas vin.”

“Do, eku, eku”, jubilis Filipino, “mi *volas* ludi militon!”

“Kiu el ni ambaŭ diros unue ‘Sufiĉas!’”, tiu malvenkis en tiu milito”, la onklo diris.

“Konsentite”, Filipino diris kun brilantaj okuloj.

“Konsentite. Do nun ni komencu.”

“Ni ja ankoraŭ ne havas pafilojn”, Filipino diris kaj levis du krudajn branĉojn. Unu el tiuj li transdonis al la onklo. Tiu eksilentis rigardante supren. Kaj li kriis: “Malaltflugaj aviadiloj!”, kaptis Filipon je la nuko kaj ĵetis sin kun li en la koton sub iu betulo.

“Sed... onklo Bernardo”, Filipino kriis, “mia dimanĉa pantalonon!”

“Kapo malsupren”, la onklo tondris. “Mentono en la saŭcon. Ne moviĝu. Aŭ ĉu vi volas, ke ili faru el vi hakitan viandon?”

Filipo trempis la mentonon en la koton. Per unu okulo li vidis, ke ankaŭ onklo Bernardo surhavis sian bonan pantalonon.

“Damne, ili revenas!” la onklo kriis. “Malsupren en la fosaĵon!”

“Sed tiu ja estas plena de akvo”, balbutis lamentanta Filipino.

“Rigardu!” kriis la onklo kaj puŝis lin kruele. “Aŭ ni pereos!”

Filipo stumblis falante en la fosaĵon, en kiu troviĝis malpura-bruna pluvakvo. Ĝi fluis en liajn kaŭĉukajn botojn. Kaj ĝi atingis liajn genuojn.

“Kaŭru!” la onklo kriis al li. “Ili ja vidas vin el distanco de dek kilometroj!”

“En la akvon?” Filipino demandis timigita.

Sen iu respondo la onklo premis lian ŝultron malsupren. Filipino devis ekkaŭri kun sia postaĵo en la akvo. La onklo kaŭris apud li.

“Panjo certe insultos”, lamentis Filipino.

“Vi ne plu havas Panjon”, onklo Bernardo diris. “Bombo trafis vian bienon antaŭ momento. Via Panjo tuj mortis. Al via avino bombosplito forŝiris la maldekstran kruron. Ŝi estas nun mortanta pro sangoperdo. Via patro estas mortigita de plafona trabo. Kaj via avo perdis siajn du okulojn. Via fratineto ankoraŭ vivas, sed ŝi perdiĝis sub ruinaĵoj. Oni ne plu trovos ŝin. Tie ŝi pereos mizere. Nun vi estas orfo, Filipino. Vo devas nun streĉi viajn fortojn por sola transvivi la militon. For el la fosaĵoj, la aviadiloj estas for. Sed tie vidalvide aŭdiĝas pafoj. Mi kredas, ke alproksimiĝas tie la malamika infanterio, por bari al ni la revojojn. Tuj ni devas foriri de



ĉi tie.”

Apenaŭ Filipino plena de akvo grimpis el la fosaĵo, la onklo diris mokeme: “Kie estas via pafilo?”

Konfuzita Filipino turniĝis. Tie ĝi ja fluis en la fosaĵo.

“Alportu ĝin – rapidege!” komandis la onklo. “Kiel vi volas fari militon sen armilo? Vi ja iĝas ridinda. Kaj la malamikoj estas jam tre proksimaj. Tion vi pagos per via vivo!”

Hontigita Filipino kaŭris malsupren ĉe la fosaĵa rando. Li klopodis alproksimigi la bastonon el la akvo. Sian dorson li turnis al la onklo.

“Nun mi ludas kvazaŭ unu el viaj malamikoj”, la onklo diris.

“Atendu momenton”, lamentis Filipino, “unue mi devas havi mian pafilon...”

Sed tuj la onklo kriis: “Levu la manojn!” kaj preparis sian pafilon. Filipino estis terurita.

“Levu la manojn – rapide!” la onklo tondris. “Ĉu vi kredas, ke mi atendas, ĝis kiam vi mortigas *min*? Ĉu vi opinias, ke mi perdus la favoran okazon por pereigi vin?”

“Ne”, Filipino kriis, “mi ne metos la manojn supren, mi ne volas esti la malvenkito!”

Kaj li ĵetis sin al la onklo, kiu ĉi-momente diris “paf!”, kaj Filipino per du pugnoj tamburis sur lia brusto.

“Kion tio signifas?” la onklo demandis. “Vi estas morta. Vi kuris rekte en mian pafon. Faligu vin. Vi estas nun kadavro, kaj mi forŝiros viajn botojn de la piedoj, ĉar mi bezonas ilin.”

Sed Filipino kriĉis: “Mi ne estas morta! Mi ne estas morta! Kaj nun *mi* faras vin morta!”

Tuj la onklo premis sian pafilon inter la genuojn, per sia sola mano li kaptis la knabon ĉe la nuko kaj ĵetis lin meze en la urtikan arbustaron inter la vojo kaj la fosaĵa rando. Filipino hurlis pro la doloroj. Ne nur la brakoj brulis. La urtikoj vipis ankaŭ lian vizaĝon.

“Tio estas malhonesto!”, li kriis furioze.

“Ĉu vi opinias, ke dum milito okazas io honesta?” la onklo demandis, kies malseka pantalone gluiĝis al liaj kruroj. “Se vi volas havi ion honestan, vi devas ludi ion alian. Dum milito ĉiu nur klopodas pereigi la alian, ne gravas kiel.”

“Kaj krome vi estas multe pli forta ol mi”, ploris Filipino.

“Dum milito ĉiam unu estas pli forta ol la alia. Antaŭe vi devus kapitulaci. Tiamaniere vi povus eviti ĉion alian.”

“Sed tiel mi ja estus la malvenkinto!” Filipino diris.

“Ĉiuj, kiuj partoprenas militon, estas malvenkintoj, kvankam kelkfoje iuj aspektas, kvazaŭ ili venkis”, la onklo diris. “Kaj nun kuru pri via vivo, se nepre vi volas daŭrigi la vivon. Venas la tankoj!”

“Helpu al mi forlasi la urtikojn”, Filipino petis malforte.

“Ĉu ni ne volus ludi *veran* militon?” la onklo demandis. “Dum milito neniu helpas al iu alia eliri la aĉaĵon. Eliru, mi diras! For! Aŭ ĉu vi volas esti platigita?”

Li puŝis la knabon antaŭ sin.

“For de la vojo – ek en la arbaron!” la onklo anhelis. “Kuru, kiom ajn rapide vi povas!”

La botoj frotis, la pantalono gluiĝis. La haŭto inter la kruroj frotiĝis.

“Mi ne plu povas, onklo Bernardo!” Filipino lamentis.

“Certe vi ankoraŭ povas”, la onklo spiraĉis, “se mi diras al vi, ke nun mi estas denove malamiko kaj provos detrui vian kapon per la kolbo. Kuru – mi venas!” Kaj li svingis sian bastonon kaj kriaĉis kun grimacanta vizaĝo: “Redonu al mi mian brakon, vi damnita hundaĉo!”

Filipo ektimis. Tiel lia onklo neniam antaŭe aspektis: kiel sovaĝa besto – brutulo!

Li komencis kuri. En kotoplana kavaĵo li perdis unu boton. Li ne kuraĝis halti. Li daŭrigis kuri sur ŝtrumpo, paŝis sur dornaj branĉetoj, sur branĉetoj kaj branĉoj. Jen kaj jen li laŭte ekkriis pro doloroj. Malantaŭ si li aŭdis alproksimiĝi la anhelantan onklon. Tute senkonscie pro timo li ŝtormis en la dornoplenan densejon antaŭ si, kaj li sentis ke la pantalono tie pendiĝis kaj ŝiriĝis, la dimanĉa pantalono. Poste li perdis la duan boton kaj surpaŝis dornojn. Li aŭdis sin ekhurli kiel hundo. Lia koro batis ĝis la kolo.

Subite li ekkonsciis, ke li ne plu aŭdis la onklon anhelanta post si. Haste li ĉirkaŭrigardis. La onklo estis ne plu videbla.

Sed tie antaŭ la arbustoj – ĉu tie ne troviĝis io kun la koloroj de ĉemizo de onklo Bernardo, verde-flave-kvadrata?

Filipo ekstaris, rigardis pli atente, maldecide li revenis. Jes, vere, tie kuŝis onklo Bernardo kun la vizaĝo malsupren kaj ne moviĝis. Lia brako pendis etendita en mirtela arbusto.

Kiel narkotita Filipino kliniĝis super li.

“Onklo Bernardo”, li flustris.

La onklo ankoraŭ ne moviĝis.

Filipo konsternita karesis lian grizan hararon petante: “Leviĝu, onklo Bernardo, mi petas vin, bonvolu leviĝi!”

Sed la onklo ne leviĝis. Tiam Filipino pro timego sentis grandan varmegon. Li komencis plori.

“Ĉu vi estas morta?” li plorsingultis. “Ho, mi petas vin, ne estu morta!”

Li karesis la hararon de la onklo, la verde-flave-kvadratitan ĉemizon, la malvivan manon. Ĉiam pli laŭte li ploris kaj pli senespere. En la varmego iĝis malvarmo. Li tremegis. Pro teruro klakis liaj dentoj.

“Vi ja ne povas esti morta, tiel simple”, li ploraĉis.

Tiam la onklo malrapide leviĝis kaj turniĝis. En lia vizaĝo gluiĝis abiaj pingloj kaj muskofloketoj. Filipino fiksigardis lin konsternita pro perplekso.

“Tamen vi ja vivas”, li flustris.

“Ne”, la onklo diris. “Mi estas morta. Mi estas trafita de kuglo. Min mortpafis iu, kiu estas ankaŭ onklo de tia knabo. Estus simpatia homo – estu iu, kiu dum paco neniam venus al la ideo mortigi iun ajn. Ĉu ni daŭrigu la ludon?”

“Ne”, Filipino balbutis, “mi satiĝis.”

“Ankaŭ mi”, la onklo diris.

Silentaj ili serĉis la botojn de Filipino. Unu el ili Filipino trovis, la alian trovis la onklo. Kaj poste ili ekiris hejmen.

“Nia milito daŭris apenaŭ dek du minutojn”, la onklo konstatis.

Filipo rigardis lin mirigita. Al li ĝi ŝajnis senfina.

“Ĉu morgaŭ denove ni ludu militon?” la onklo demandis.

“Ne”, Filipino respondis haste, “neniun militon. Nenion plu pri milito.”

“Antaŭe mi ja traktis vin aĉe”, la onklo diris. “Mi ne faris tion facilanime. Sed mi faris tion, ĉar mi ŝatas vin. Mi volas klarigi al vi, kio fakte estas milito.”

“Mi tiom timis vin”, spiraĉis Filipino kaj suprentiris la nazmukon. “Vi aspektis kiel besto, kiam vi postkuris min kun la bastono.”

“Dum la milito la homoj iĝas bestoj”, la onklo diris serioze.

“Kaj poste mi timis pri vi, ĉar mi pensis, ke vere vi estas morta.”

“Dum milito tia morto estas ĉiutagaĵo. Siatempe mi ne plu rigardis, kiam mi vidis la kuŝantajn mortintojn ĉe la vojrandoj. Por vi la morto ne estu ĉiutaga. Mi volas, ke vi havu viajn du brakojn. Neniu tanko platigu vin, neniu bombo frakasu vin, neniu pafo trafu vin. Vi kaj ĉiuj, kiujn ni ambaŭ amas, restu vivantaj sen damaĝoj. Kaj se vi volas esti heroo, vi trovas okazon esti heroo ankaŭ dum paco.”

Filipo ŝovis sian manon en la manon, kiu restis ankoraŭ al lia onklo, kaj diris: “Mi tiom deziras, ke vi havu ankoraŭ vian alian manon.”

“Mi ja estis ankoraŭ bonŝanca”, la onklo diris. “Vi vidas: oni povas ankoraŭ vivi nur kun unu mano. 60 milionoj da homoj perdis sian vivon dum la pasinta milito. Inter tiuj certe troviĝis ankaŭ kelkaj miloj da tiaj knaboj kiel vi.”

Dum la lasta parto de la vojo ili silentis. Inter la paŝtejo kaj la bieno la onklo diris: “Mi kredas, ke via patrino ektimus, se ŝi vidus vin tiel se ia preparo. Atendu ĉi tie, ĝis kiam mi klarigos al ŝi ĉion. Mi timas, ke ŝi estos kolera je mi. Ŝi ja nenion scias pri milito. Ŝi naskiĝis nur post la milito.”

“Mi jam scias, kion ŝi diros”, Filipino diris. “Kompatinda infano! Li ja povas malsaniĝi je pneŭmonio! Kaj kia aflikto pri la ĉemizo kaj la pantalone!”

“Mi promesos al ŝi, ke mi aĉetos novan ĉemizon kaj novan pantalonon!” la onklo diris, “kaj grandan pakon da paperaj naztuko. Tian valoron la afero havas por mi. – Kiam mi fajfos, vi povos veni”.

Kiam la onklo iris kelkajn paŝojn, Filipino vokis post li: “Dankon, ke vi montris al mi la militon.”

*La 4-an de majo festis sian 60-jariĝon konata tiĥvina esperantisto kaj tre bona homo Viktoro Kandalinskij. REGo gratulas lin kaj deziras longan vivon, bonan sanon, feliĉon kaj novajn E-aktivaĵojn!*

## **POR VIKTORO**

Nia vivo estas longa, Viktoro,  
Longa pli, ol de l' viraro rusia.  
Do se foje perfidemas la koro –  
Traktu tion kun tolero konscia.

Nia vivo estas riĉa, Viktoro, –  
Riĉa pli, ol ĉiutaga grizejo,  
Ĉar ja, ekster la rutina laboro,  
Ni la mondon opinias la hejmo.

Nia vivo estas trafa, Viktoro,  
Ne misvoja, ne sencela, ne blinda.  
Nia oro, nia sola trezoro  
Estas nia amikaro fidinda.



Nia vivo estas bela, Viktoro,  
Ĉar la sun' leviĝas en oriento,  
Ĉar pli gravas ĉiam floro ol gloro,  
Ĉar superas ĉiam forton la sento.

Do plu vivu ni kaj danku por tio  
Nian sorton kaj senkorpan misteron,  
Kaj en ĉiu nova vivofolio  
Skribu amon, venkon, bonan aferon.

***Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin)***

